




4*88.127.

STARTO

ORGANO DE
ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Prof. D-ro J. Cúth
dum Monda Paĉkonsilio

NABÍDKA ESPERANTSÝCH PROPAGAČNÍCH MATERIÁLŮ

Objednávky vyřizuje: Český esperantský svaz, expedice tiskovin
 Jilská 10
 110 01 Praha 1

Odznaky: esperantských svazů, resp. organizací		
CES (vlajka, hvězdička, trojúhelník)	Kčs	5,-
Z.o. Třebíč, tábor Lančov	"	6,-
jugoslávský	"	6,-
mírový pětijazyčný	"	4,50
mírový s holubicí	"	4,-
veteránů, železničáři, sběratelé, medicín. sekce	"	5,-
minerologové	"	14,-
sběratelská kuriozita - ryby v deseti barvách - 1 ks	"	5,-

Samolepky: Propisot - 50 zelených a zlatých samolepek s esperantskými symboly	Kčs	27,-
zeměkoule nebo holubice (kulaté, zelené), balení po 10 kusech	"	6,-
kulaté "Lingvo internacia" - 1 ks	"	2,60
kulaté "Lingvo internacia" - aršík 4 ks	"	5,-
aršík 100 jaroj, zeleď, stříbrná, 10 ks	"	5,-
aršík dtto 15 ks	"	7,-
aršík hvězdička, zelená s E 25 ks	"	7,-
aršík mírové, kulaté 5 ks	"	5,-

Pohledy: fotografie barevné, text v esperantu:		
Čsl. lázně, Pozdrav z CSSR, Pozdrav z Prahy,		
Esp. střediska v CSSR, Letní esp. tábor Lančov - 1 ks		1,60

Různé: medaile ke 100. výročí esperanta,		
dílo akademického sochaře J. Marcuby,		
tombak - s etuí	Kčs	144,-
" bez etue	"	130,-
gramodeska country skupiny Barbuloj - Vousáči		
4 písně v esperantu	"	16,-
esperantská vlajka, zelený trojúhelník,		
bílý střed s E, pro zavěsát	"	13,50
igelitová taška ke 100. výročí, zelený tisk	"	4,-
igelit. taška Esperanto-klíč k světu, tisk		
modro-zlatý	"	2,50

Plakáty (až do vyčerpání zásob):		
Jediný jazyk možný dorozumění s celým světem	"	0,70
k 100. výročí esperanta	"	0,50

Publikace o esperantu:		
J. Vondroušek: Historie a spisovatelé - stručný přehled dějin a literatury esperanta pro první informace zájemců o jazyk a hnutí, česky	"	5,-
S. Kamarýt: Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio - podrobný přehled vývoje esp. hnutí u nás od počátku. Přehled literatury, rejstřík osob.	"	42,-
V. Novobilský: Česká literatura v esperantu. Esperantská díla českých autorů. Přehledná bibliografie, česky a esperantsky	"	9,-

SALUTLETERO

al Monda Packonsilio

En Prago okazis kunsido de la estraro de Monda Packonsilio de la 19-a ĝis la 22-a de marto 1988. La porpaca sekcio de Ĉeĝa Esperanto-Asocio uzis la okazon kaj la unuan tagon de la kunsido transdonis al la reprezentantoj de la Monda Packonsilio jenan salutleteron:

"La porpaca sekcio de Ĉeĝa Esperanto-Asocio salutas la kunsidon de la estraro de Monda Packonsilio en Prago dum la tagoj 19-a - 22-a de marto 1988. Ni deziras al via renkontiĝo kaj traktado plenan sukceson, kiu helpos al la sekurigo de la mondopaco. Ni, esperantistoj-pacdefendantoj, aliĝas al via celado apogante ĝin inter esperantistoj de la tuta-mondo tiel, ke ni esperantigos la rezultojn de via traktado kaj aperigos ilin en Esperantaj gazetoj."

La Esperantan delegitaron tre afable akceptis Prof. JUDr. Juraj Cúth, DrSc., membro de estraro de la Monda Packonsilio, vicprezidanto de la Ĉeĝoslovaka Pac-Komitato kaj prezidanto de la Slovaka Packonsilio. En sia alparolo li diris i.a.: "La ĉs. porpaca agado iras en la unuaj vicoj de nia socio, por plifortigi la tutmondan pacmovadon per novaj vojoj kaj manieroj de la laboro. Pruvo de tio estas, ke en Prago oni okazigas la estrarkunsidon de la Monda Packonsilio, kiu ĉi-tempe kunigas batalantojn por la paco el pli ol 140 landoj..."

Por ni, esperantistoj, tre optimisme sonis jenaj liaj vortoj: "Ni ja scias pri via agado, pri via strebado por internacia interkompreniĝo. Ni tre estimas ĝin kaj mi konsilas: daurigu la klopodon, ĉar ĝi estas la plej nobla celo, kiu kunigas nin ĉiujn..."

Tiuj vortoj plenigis nin per nova entuziasmo kaj eĉ fiero - ĉar la kunsidon partoprenis ankaŭ "nia ano" - samideano D-ro Imre Pethes, membro de la estraro de la Monda Packonsilio kaj prezidanto de MEM.

La MEM-delegacio alportis amason da porpaca materialo: la ĵus eldonitan ĉs. numeron de Paco 1987, la suplementan broŝuron pri Karel Capek kaj la porpacajn desegnaĵojn de Pavel Rak - ĉio estis metita sur tablojn en la antaŭkunsido, je dispono al la partoprenantoj de la estrarkunsido. La salutletero de nia porpaca sekcio estas aperigota en la Kunsida Bulteno.

Ing. M. Turková
H. Struncová



La 21-a KONSULTIĜO

Post Mělník kaj Přerov estis Ĉeské Budějovice la tria ĉeĥa urbo, kiu gastigis reprezentantojn de Esperantaj asocioj, kiuj ĉeestis la 21-an Konsultiĝon de Esperanto-Asocioj de socialismaj landoj. Kiel jam kutimiĝis, al traktadoj alveturis ne nur gravaj funkciuloj, sed ankaŭ homoj tre laboremaj kaj agemaj. Tial ĉiuj kvin labortagoj inter la 24-a kaj 29-a de aprilo estis plenumitaj per streĉaj traktadoj kaj longhoraj gravaj diskutoj. Nur la speciala akcepto de la partoprenintoj fare de vicurbestro en la historia urbdomo de Ĉeské Budějovice, refreŝiga rondpromeno tra la urbo kaj amika vespero kun tre bonimpresa kultura programo, kiun prizorgis la loka klubo "La Progreso", interrompis la tuttagajn sesiojn. Krom komunaj traktadoj okazis ankaŭ kelkaj dulandaj diskutoj pri solvendaj problemoj, kunvenis ankaŭ la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato. Ĉar plejmulto de la ĉeestintoj volis partopreni la ĝeneralan konferencon de MEM en Budapeŝto, la 21-a Konsultiĝo de SLEAJ finiĝis ĵaude en malfruaj vesperaj horoj.

Nian asocion reprezentis trimembra delegitaro: Ing. Vlastimil Kočvara, kiu ankaŭ organizis gvidis la tutan programon, doc. RNDr. Vlastimil Novobilský CSC kaj PhDr. Marie Vančurová. Sed da kunlaborintoj, kiuj grave kontribuis al sukceso de la laborrenkontiĝo, estis multe pli - komitatanoj kaj membroj de la Esperanto-klubo "La Progreso". Ili ne nur plenumis necesajn antaulaborojn, sed dum konsultiĝoj ili tage-nokte protokolis, multoblis, prizorgadis ĉion, kio necesis. Tial la dankojn meritas gesamideanoj R. Vlková, Št. Papírnik, J. Repa kaj aliaj, kiuj ĉiam estis pretaj labori laŭ bezono.

La 21-a Konsultiĝo de SLEAJ, kiun laŭ akceptitaj longdaŭraj planoj organizis Ĉeĥa Esperanto-Asocio, jam enpaŝis en historion kiel plua utila kaj grava paŝo al profundigo de kunlaboro inter amikaj Esperanto-organizaĵoj. La fina komuniko estis akceptita unuanime, pluraj rekomendoj eniros en venontajn laborplanojn de ĉiu partopreninta asocio.

K O M U N I K O

vlko

Inter la 24-a kaj 29-a de aprilo 1988 en Ĉeské Budějovice (ĈSSR) okazis la 21-a Konsultiĝo de Esperanto-asocioj de socialismaj landoj.

Partoprenis delegitoj de la landaj asocioj el Bulgario, ĈSSR (ĉeĥa kaj slovaka asocioj), GDR, Hungario, Kubo, Pollando (PEA kaj Pola Studenta Esperanto-Komitato en la Asocio de Polaj Studentoj), Soveta Unio kaj Vjetnamio.

La partoprenantoj substrekis la gravecon de la komenciĝanta procezo de malarmado kaj malstreĉiĝo, kiu kreas favorajn kondiĉojn por la plua evoluo de la Esperanto-movado en la mondo.

La Konsultiĝo alte taksis la rezultojn de la Esperanto-movado lige al la 100-jariĝo de la Internacia Lingvo kaj emfazis aparte la grandan kontribuon de Pola Esperanto-Asocio, kiun ĝi donis per la organizado de la jubilea kongreso.

La Konsultiĝo i.a. traktis kaj interkonsentis pri problemoj de pli efika praktika kunlaborado inter la partoprenantaj asocioj, diskutis pri eldonplanoj, la starigota Zamenhof-centro en Bjalistoko, la Internacia Kultura kaj Kleriga Centro en Poprad kaj pri la aktiviĝo de la junulara agado.

La partoprenantoj dankas al Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj al la Esperanto-klubo "La Progreso" pro la bonaj laborkondiĉoj.

Ĉeské Budějovice, 28. 4. 1988

RIGARDOJ en la estontecon



Ni staras ĉesojle de la dua jarcento de Esperanto. Prof. Tonkin en sia elpaŝo dum la kongreso en Varsovio tre sprite trairis la unuajn cent jarojn. Per kelkaj rigardoj reen li elvokis en ni imagon, kion d-ro Zamenhof atendis kaj esperis, ne povante antaŭsentii, kiujn malfacilaĵojn kaj barilojn la nova lingvo renkontos, kiaj eblecoj kaj ofte nerealigitaj eblecoj venos. Enirante la novan jarcenton ankaŭ ni ne scias, kio venos, kiaj situacioj aperos. Tamen, ni devas fari tion, kion postulas prof. Tonkin: pliperfektigi nin mem, disvastigi konon de la lingvo, apliki ĝin.

Sed neniu ankoraŭ diris, kion ni celas per tio. Kaj tamen, ege gravas koni plej eble precize la celon, por povi ĝuste formi nian agadon.

Kompreneble, mi ne intencas ĉi tie altrudi iun preskribon. Prefere mi volus instigi cerbumi pri tio.

Neniu el ni scias, kiel aspektos la sekva jarcento, sed ni devas laŭ atendebla evoluo starigi kelkajn verŝajnajn alternativojn. Jam la nunaj disputoj inter esperantistoj atestas, ke ni havas ofte malsamajn imagojn pri rolo de Esperanto en la estonto. Mi pensas, ke oni povus dividi tiujn imagojn en du ĉefajn grupojn:

1. Kelkaj imagas, ke Esperanto iam fariĝos unu sola lingvo sur la Tero. Kaj ke ni devas celi al tio. Se tio vere devus okazi, oni parolus kaj skribus Esperante en la tuta mondo, oni verkus faklibrojn, romanojn, poemojn kaj fabelojn; infanoj babilus en Esperanto ekde lulilo, estiĝus populara, ĉiutaga, brutala kaj afabla, fajna kaj maldelikata, kultivita kaj primitiva Esperanto, certe formiĝus ankaŭ dialektoj laŭ influo de la lokaj lingvoj, simile kiel ekz. la latino transformiĝis, laŭ influo de la lokaj lingvoj en diversajn latinidajn lingvojn. La etnaj lingvoj kaj kulturoj malaperus. Nur malfacile imageble. Tiukaze estus trafe konstrui riĉan Esperanton, transparentan novajn vortojn el multaj lingvoj, laŭ bezono. Io simila okazis en la angla, kiu havas por plejparto de la nocioj tri esprimojn, kvankam kelkfoje nuancitajn: unu laŭdevene celtan, duan germanan, trian latinidan. Shakespeare, laŭdire, utiligis en siaj verkoj ĉiujn, kaj tiel liaj verkoj estas eĉ por anglalingvanoj malfacile legeblaj. Imagu nur, ke Esperanto havus ankaŭ diversdevenajn sinonimojn, unu ekz. germandevenan, alian svahilan, alian ĉinan.
2. Aliaj imagas Esperanton kiel lingvo-ponto. Se oni veturas per aŭtomobilo, oni eĉ ne perceptas ĉu oni veturas surponte aŭ sur normala strato. Sed tamen, iu diferenco ekzistas. Ponto havas ĉion, kion oni bezonas por veturado kaj marŝado: ŝoseon, troturojn, lanternojn, trafiksignojn. Sed ĝi ne havas apud si domojn kun vendejoj kaj gastejoj, parkejojn, arbovicojn kaj florbedojn.

Tiuj tro pezigus, komplikigus la ponton kaj ni povas uzi ilian denove post kiam ni transiros la ponton. Do, ĝi devas havi ĉion, kion ni bezonas por kunigi la ambaŭ bordojn, sed nenion plu. Ponto devas esti simpla, sen iaj superfluaĵoj. Ankaŭ la ponto-lingvo devas esti simpla, facile ekregebla. Ĉi devas sekure, fideinde kaj komforte kunigi naciojn kaj kulturojn, kaj tute de damaĝi ilin.

La ponto-lingvo - Esperanto - devas esti klara, unusignifa /relative/, struktureca, responde al la bezonoj de la epoko. Ĉu povas ekzisti pli bona pritakso de Esperanto ol se oni "enlegigas" en libron tiomgrade, ke oni forgesas, ke oni ne legas en sia gepatra lingvo, kiel skribis al mi unu el miaj amikoj en Sovet-Unio?

Mi inklinas, kompreneble, al la dua alternativo.

Memoru nur, kiom da nacioj en la historio malaperis, ĉar ilin ekregis pli fortaj nacioj kaj lingvoj. Ni memoru nur la lastan mond militon, kiam plano de la naziistoj estis nenigo de la subpremitaj nacioj per germanigado. Antaŭ 200 jaroj Josefo la Dua, cetero tre klera monarko, volis havi ankaŭ lingve unuecan imperion. Tiucele li germanigis. Sed per tio li revekis en ĉiuj nacioj de sia regno intereson por siaj lingvo kaj kulturo. Ekstis nacia revekigo kaj tiel saviĝis la ĉeĥa, slovaka, hungara, serba kaj aliaj lingvoj kaj nacioj. Ĉiu el ni estas almenaŭ iomete patrioto. Ni amas nian gepatran lingvon, kulturon, kutimojn kaj historion. Ĉu estus al ni egale se la nacia revekigo ne estus sukcesinta kaj ni en la Meza Europo nun parolus germane? Al ĉi eble jes, sed ĉiukaze tio estus malriĉigo de la monda kulturo, ĉar ĉiu kulturo havas sian postenon en la mondo kaj certan influon al la evoluo de la mondo.

Sekve estas necese agi tiel, ke la bunteco de la kulturoj en la mondo konserviĝu, ke la naciaj kulturoj ne estu absorbataj per grandaj popoloj, sed ke ĉiuj estu egalrajtaj tiom, kiom tion postulas ekz. la Fina akto de Helsinki 1975.

Ni volas, ke pereu nek la luzaciaj serboj, nek romanĉoj, nek vaskoj. Kial ili ne vivu laŭ sia maniero kaj havu kontakton kun aliaj nacioj helpe de Esperanto? Kial la luzaciaj serboj havu tiun kontakton pere de la germana, kial la romanĉoj pere de la germana aŭ la itala, kial la vaskoj pere de la hispana?

Se ni volas atingi ĉi tiun aplikon de Esperanto, ni devas zorgi, ke ĝi restu planlingvo, ke ĝi evoluu racie, prudente, logike kaj strukturece. Kaj al tio estas necesa studaĉo. Esperanto havas ankoraŭ multon, kio estas kaŝita kaj ankoraŭ ne malvualita.

Jiří Laube

La 17an de januaro 1988 mortis en aĝo de 65 jaroj

s-ano Miloš R u d o l f .

Li estis dum multaj jaroj vicprezidanto de Esperanto-klubo en Olomouc kaj en la jaro 1955 li iniciatis kreon de Tutŝtata konsulta komitato esperantista /TKKE/. La celo de ĉi tiu organo estis kunordigadi laboron de nialandaj Esperanto-rondetoj. S-ano Rudolf funkciis kiel sekretario de TKKE ĝis jaro 1957, kiam ĉi tiun organon anstatauis Ĉeĥoslovaka Esperanto-komitato, kiun kreis ministrio por lernejaferoj kaj kulturo ĉe Kleriga instituto en Praha.

EK Olomouc

internacia lingvo kaj scienco

Elektronon malkovris en 1897 jaro angla esperantisto Joseph John Thomson. Pro tiu malkovro li ricevis en 1906 jaro Nobelan premion. En la sama jaro J. J. Thomson iniciatis fondon de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE), kies ĉefa celo estis diskonigo de la internacia lingvo inter sciencistoj kaj uzado de ĝi kiel lingvo de scienco.

Tiu asocio ekzistas plu hodiaŭ, ĝia oficiala organo "Scienca Revuo" estas redaktata en Prago kaj presata en patrujo de Galilej en itala urbo Pisa. La asocion eniras la sekcioj: matematika, astronomia, ornitologia, kibernetika, medicina, geologia - ĉiu kun sia presorgano. La organo de geologia sekcio la kolekto "Geologio internacia", kiun oni presis en Hungario kaj ĈSSR, en jaro kuranta aperos en eldono de Akademio de sciencoj de Taĝika SSR, ĝi estos la unua esperantlingva scienca eldonaĵo en nia lando.

Krom periodaĵoj de ISAE en esperanto aperadas ankaŭ aliaj scienc-teknikaj revuoj. Inter ili la plej disvastigitaj estas: organo de Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj la revuo "Scienca Mondo", kiu estas eldonata ankaŭ en rusa, angla, franca kaj germana lingvoj; organo de Ĉina Akademio de Sciencoj la revuo "Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj", eldonata en ĉina kaj internacia lingvoj; la organo de Universala Medicina Esperanto-Asocio "Medicina Internacia Revuo" (eldonata en Japanio); la revuo "Sciencaj Komunikaĵoj" (eldonata en Budapeŝto) kaj ankaŭ aliaj malpli disvastigitaj periodaĵoj.

Dum lastaj jardekoj estas kompilitaj, presitaj aŭ pretigitaj por presado la vortaroj el multaj branĉoj de scienco kaj tekniko. Antaŭ ĉio tiu estas Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 1300-paĝa, kies konsiderindan parton okupas difinoj kaj traktadoj de scienc-teknikaj terminoj. Ĝi kvarvoluma seslingva vortaro pri geodezio, naŭlingva ekonomika, dekunulingva matematika, du-kaj trilingva kemiaj, angla-esperanta-ĉina komputika vortaro, oklingva ornitologia. Pretigita por presado esperanta-pola politeknika vortaro, kiu enhavas 80 mil vortojn, laŭ riĉeco superas multajn naciajn teknikajn vortarojn.

Esperanta-multlingvaj vortaroj estas kompilitaj, kiel regulo, de internaciaj kolektivoj de sciencistoj. Kiel ekzemplon de tia kunlaboro indas nomi eldonitan en Budapeŝto kvinlingvan esperanto-vortaron pri komputiko, en kies kompilado partoprenis sciencistoj de Bulgario, Pollando, Hungario, GDR, USSR, ĈSSR. Estas eldonitaj ankaŭ pretaj por presado terminaroj pri komputila tekniko, medicino, biokemio, aviado, aŭtotekniko, poligrafio, botaniko, hortikulturo, ornitologio, meteorologio kaj aliaj. Nun en Tellin estas presata Granda esperanta-estona vortaro dense saturita per sciencaj kaj teknikaj terminoj.

Por enkonduki internacian lingvon en sciencan necesas havi lernan, popularsciencan kaj sciencan literaturon en tiu lingvo. La unua, verkita en esperanto scienca verko estis eldonita en 1910-12 jaroj trivolumo pri neeuklida geometrio. En 20-aj jaroj estis verkita kaj eldonita en esperanto libro pri botaniko "Vivo de plantoj" kaj po-

pulara libro "Mi jam komprenas la radion", kiu estis tradukita en 20 lingvojn, en tiu kvanto ankaŭ en la rusan.

Verkado kaj eldonado de lernolibroj, sciencaj kaj popularsciencaj libroj konsiderinde pliiĝis ekde komenco de 50-aj jaroj. Ĝis hodiaŭ estas eldonitaj lernolibroj kaj kursoj de altlernejaj lekciroj pri 30 lernobjektoj: fiziko, kemio, kemia nomenklaturado, matematiko, biologio, entomologio, medicino, interlingvistiko, geologio, geografio, radiotekniko, korpokulturo kaj aliaj pli specifaj branĉoj.

Speciale notinda estas eldonita antaŭ du jaroj en Ĉikago lernolibro "Ĝenerala, organika kaj biologia kemio" tradukita el la angla de internacia kolektivo, en kiu estis ankaŭ nia recenzanto de la traduko. La lernolibro estas destinita ĉefe por lernantoj kaj studentoj de Afriko. Dediĉon en la lernolibro skribis duobla laureato de Nobelpremio, kavaliro de ora medalo "Lomonosov", usona biokemiisto Linus Pauling, kiu de junaĝo konas esperanton. Interalie, destinita por Afriko esperanta-svahila vortaro estis eldonita en Anglio antaŭ ol aperis la menciita lernolibro.

Okaze de jarcento de esperanto la revuo "Ĥimija i ĵiznj" (Kemio kaj vivo) n-ro 7 sur ses paĝoj presis enhavriĉan artikolon "Internacia scienco kaj internacia lingvo". Sur lasta paĝo de la revuo, ankaŭ dediĉita al esperanto, estas vortoj de John Bernal: "Vere sovaĝan spektaklon prezentas amasego da homoj, kiuj kolektigis en scienca konferenco... absolute ne kapablaj interkomunikiĝi sen tradukisto."

En lastaj jaroj kiel iniciatinto de uzado de esperanto en sciencaj konferencoj elpaŝis Internacia Asocio de Kibernetikistoj, kiu en 1980 jaro dum IX Internacia konferenco pri kibernetiko en Namur (Belgio) apude kun angla, franca kaj germana lingvoj akceptis ankaŭ esperanton kiel laborlingvon.

En 1982 jaro en Budapeŝto okazis internacia scienca konferenco "Interkomputo-82" kun la temo "Homa lingvo kaj komputilo", kies ĉiuj prelegoj estis en la internacia lingvo, inter ili sep prelegoj de sovetiaj sciencistoj. Ankaŭ dum internacia konferenco en Budapeŝto "Interkibernetiko-85" sola labora lingvo estis la internacia. Esperanto estas akceptita kiel la labora ankaŭ en regulaj ekologiaj forumoj en Sviŝtov (Bulgario).

En julio 1986 jaro Ĉina Akademio de sciencoj organizis internacian konferencon pri scienco kaj tekniko, kies laborlingvo estis nur la internacia.

En aŭgusto 1986 jaro en Siracousa (Usono) okazis kvara Internacia kongreso de ekologoj kun angla kaj internacia laboraj lingvoj. Eldonita en Sofio kolekto de prelegoj de tiu konferenco enhavas prelegojn en internacia lingvo en unu kaj duono fojoj pli multe, ol en la angla.

En 1985 jaro en Respubliko San Marino estis fondita Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), en kiu oficiala lingvo estas esperanto. La Akademio havas ses sekciojn, tiujn de: kibernetiko, filozofio, kulturaj, strukturaj, naturaj kaj morfologiaj sciencoj, ĉiu kun multaj fakoj. En aprilo 1986 jaro 21 akademianoj de naciaj Akademioj de sciencoj fondis ankoraŭ unu Internacian Akademion de Sci-

enĉoj, kiu troviĝas en tutmonde fama scienca centro Uppsala (Svedio) kaj kies oficiala lingvo estas ankaŭ esperanto.

En jaro kuranta instituto de historio de naturscienco kaj tekniko de AS USSR ekkomencis eldonadon de serio de artikolaj kolektoj "Problemoj de efika informado". Unu kolekto de tiu serio estos dediĉita al rolo de esperanto en efika informado.

M. POPOV,

kandidato de fizik-matematikaj sciencoj,
docento de Berdjanska pedagogia instituto,
adjunkto de Akademio Internacia de Sciencoj.

La artikolo estis presita en ukraina lingvo en
ĵurnalo "Pivdenna zorja" (Suda aŭroro) n-ro 130
de la 15-a de aŭgusto 1987, Berdjansk, USSR.

SCIENC-TEĤNIKA SEKCIO DE ĈEA

El Raporto pri la agado de la Scienc-teĥnika sekcio de ĈEA en la jaro 1987 ni elprenas jenon:

Terminologia kaj normiga faka grupo /FG/, ĝis nun identa kun Normiga sekcio de TEC /gvidanto inĝ. Jan Pospíšil, Lublanská 49, CS-120 00 Praha2/. Membroj: P. Chrdle, V. Hník, J. Hradil, K. Kraft, J. Laube, M. Malovec, J. Novák, V. Novobilský, J. Pluhař, J. Rybář, L. Středa, K. Traxler, J. Pospíšil /la estro/. Ekde UK 87 estis en la Normiga sekcio de TEC traktataj jenaj Esperanto-normoj por akcepto en la Normiga sekcio:

TEC PRI 006350 ESPERANTO-NORMO, arango, strukturo, aproba procedo,
TEC PRE 003350 NUMERADO DE TEC-DOKUMENTOJ
TEC PRE 529100 INDIKADO DE DATOJ KAJ TAGAJ TEMPOJ
TEC PRE 003034 TRANSLITERADO PER LA ESPERANTO-ALFABETO, cirila skribo, la rusa,
TEC PRE 651713 LETTER-SIGNOJ EN TEC
TEC PRE 003353 NUMERADO DE TEKSTOJ

Komencitaj estis laboroj pri entute 43 TEC-dokumentoj, el ili pri 3 terminologiaj principaroj, pri 13 normigaj preskriboj kaj pri 27 normaj terminaroj. Plejmulto el ili estas jam en labora stato. El la normaj terminaroj estas pretaj por enkonstitigo: 1. Aeronautiko 1 - ĝeneralajoj, 2. Leĝaj unitoj 0 - ĝeneralaj principoj pri grandoj, unitoj kaj simboloj, 3. Universala dekuma klasifiko - konciza eldono /ambau lastaj estas preskriboj kun terminara.karaktero/, 4. Fizikaj grandoj kaj unitoj, 5. Terminologia terminaro, 6. Teĥniko ĝenerale /parte/, 7. Gifako /parte/, 8. Komputiko /en GDR jam en komputilo, sed ne en Tec-formo/, 9. Hidraulaj meĥanismoj, 10. Teorio de varmintersanĝo - alttemperatura varmiko, 11. Morfologio de plantoj, 12. Pelt-industriaj operacioj, 13. Akustiko. Lanĉita la afero de norma terminaro TEĤNIKO ĜENERALE; petitaj 28 fakuloj-teĥnikistoj pri kunlaboro; el la 43 teĥnikaj fakoj 12 fakoj ankoraŭ nekovritaj per koncernaj fakuloj. Lanĉita la afero de HxK-konflikto kaj pri esperantigo de latinaj biologiaj nomenklaturejoj /principaro/.

Geodezia FG /gvidanto Václav Stibůrek, J. Franka 1731, CS-256 01 Benešov/ daurigas preparan laboron por faka terminaro ĉeĥa kaj Esperanta. Per planata establiĝo de terminologia komisiono pri geodezio en TEC la laboro internaciigoŝ kaj iom aliformiĝoŝ precipe per pli intima kunlaboro kun la hungaraj geodeziistoj.

FG aviado /gvidanto ing. Jan Pospíšil, Lublanská 49, CS-120 00 Praha 2/ en 1987 ne aktivis. Ĝia gvidanto estis tute okupata per preparlaboroj por fondo de TEC. Estos starigita Termigologia komisiono por aeronautiko en TEC. La unua parto de la aerogautika terminaro preta por komputilo, la ceteraj 14 partoj ankoraŭ en slipoj /ca 60 000/.

Akustika FG /gvidanto Miroslav Baroš, Zápotockého 695, CS-757 01 Valasske Meziříčí/. La unua versio de la akustika terminaro estas preta por recenzado. Ĝi devos esti verŝajne iom modifita laŭ principoj de la normigaj preskriboj de TEC. Recenzantoj estas serĉataj.

Biologia FG post forpaso de prof. Mlynář ne havas gvidanton. Karel Kraft klopodos peri la finredakton de liaj verkoj. Lian Morfologion de Plantoj recenzis prof. Neergaard, kiu en decembro 1987 mortis. Ing. Pachter el la Rondo de Esperantistoj-Flauristoj klopodos trovi alian lektoron. D-ro Kavka pretas daurigi la laboron super la Sistematika Botaniko /en slipara formo/. S-ino Mlynářová daurigas kompletigon de la botanikaj vortaroj de sia edzo.

Komputista FG /gvidanto ing. Josef Vojáček, Sochorova 13, CS-682 01 Vyskov/ sciigas, ke en la jaro 1987 ĝi ne laboris. Por 1988 estas antaŭvidata intensigo de la terminologia laboro kaj la gvidanto alvokas ĉiujn komputistojn partopreni tiun ĉi gravan laboron.

Kunlaboro de membroj de STS ĈEA al fakaj aranĝoj.

En 1987-05-20/24 okazis en Altaj Tatroj interlingvistika seminario, kiun organizis omaĝe al la centjariĝo de Esperanto la Slovacia kaj la Ĉeĥa Esperanto-Asocioj. En la organiza komitato kunlaboris anoj de STS ĈEA inĝ. J. Werner kaj d-ro V. Novobilský. Prelegojn prezentis J. Pospíšil kaj V. Novobilský.

Preparkunsido por fondo de Terminologia Esperanto-Centro, Praha 1987-07-04. I.a. estis pridiskutita programo de la unua konferenco de TEC en Varsovio kaj laborplano de TEC, speciale tiu de Normiga sekcio kaj Sekcio de Reprezentantoj de TEC.

1987-07-24 en Varsovio, kadre de la UK, estis aprokata fare de UEA-Komitato la statuto de TEC. La diskuton gvidis J. Pospíšil, kiu estis elektita kiel gvidanto de Normiga sekcio de TEC kaj membro de la estraro.

TEC-kunveno, Berlino 1987-10-10. Partoprenis la estraro, invititoj kaj R. Eichholz. Interkonsento kun la direktoro de TC ISAE R. Eichholz pri ĉiuflanka informado de TEC kaj de TC. Ambaŭflanka klarigado de eliraj konceptoj.

Publikiga aktiveco de STS ĈEA:

Aperis memstara publikaĵo: Karel Traxler: Právnícký slovník česko-esperantský. Jura vortaro ĉeĥa-Esperanta, ĈEA Praha 1986, pĝ. 137, prezo 43 Kčs.

Internacia scienca-teĥnika kunlaboro.

Dauris kontaktoj kun scienc-teĥnikaj formajoj en la najbaraj landoj, en Kubo kaj en la Ĉina Akademio de Sciencoj en Pekino.
Grava kunlaboro realiĝis en konstituiĝo de TEC.

Informa agado de STS ĈEA.

Ni elprenas jenajn artikolojn:

Zdeněk Pluhař: Terminologia kurso, Heroldo de Esperanto 13/1986, p.3
Jiří Laube: Informo pri la terminologia kurso. Tutmondaj sciencoj
kaj teĥnikoj, 3/1987, pĝ. 45-46.

Vlastimil Novobilský: Usona lernolibro "Ĝenerala, Organika kaj Biokemio" en Esperanto, Radiostacio Ŭstí n.L., 1987-01-22 en la programo "Atlas".

Diversaĵoj.

- KIU KIAM? Interlingvistika memor-kalendaro, ĉeĥoslovaka parto /personoj plus gravaj okazintaĵoj kaj eventoj/ Kompilis Jaroslav Mařík. Artur E. Iltis, Saarbrucken, 1987, 32 p, 21x14 cm, eldonkvanto 100 ekz., prezo ne fiksita.
- Membroj de STS partoprenas en la preparo de la ĝenerala E-ĉeĥa kaj ĉeĥa-E vortaro por la Ŝtata Pedagogia Eldonejo kiel verkantoj kaj fakaj recenzantoj /ing. Pluhař, d-ro Kavka, ing. Pospíšil, ing. Werner, s. Malovec/. Estas kontaktoj kun hungara vortarista grupo kaj kun germana leksikologo d-ro Krause.
- Anoncitaj seminarioj pri terminologio en Praha ne okazis pro ne-sufiĉa intereso en la publiko.
- Gvidanto de la Normiga sekcio de TEC ing. J. Pospíšil informe vizitis Ĉeĥoslovakian Scienc-Teĥnikan Societon /CSVTS/ kaj Oficejon por Normigado kaj Mezurado /UNM/ en Praha, kie li informiĝis pri ebla kunlaboro sur la tereno de normigado.
- S-ano Antonín Bombionka laboras /en internacia kunlaboro/ sur vortaroj. La sekvaj estas malnete pretaj: 1. La koniferoj. 2. Euro-paj birdoj flugipovaj. 3. Galinoformaj de la tuta mondo. 4. Papagoj de la tuta mondo. En komenca stato estas: Europaj drog-vegetaloj.
- Por membroj de STS estas nun elpruntado de libroj en la sekcia biblioteko senpaga. Necesas nur resendi la librojn registrite.
/La jarraporton kompilis Doc. Vlastimil Novobilský kaj Jiří Laube/



TERMINOLOGIA E-CENTRO

Raporto pri la 1-a Konferenco de Terminologia Esperanto-Centro (TEC) Varsovio, Kongresejo, 1987-07-27.

En la Prezidio ĉeestis: E. D. Krause, leksikologo; P. Arnaudov, matematikisto; C. O. Kiselman, Sekretario de Akademio Comenius; T. Witkam, projektgvidanto de DLT; J. Pospíšil, sekciestro por normigo; W. Blanke, sekciestro por reprezentantoj de LA; I. Bujdosó, sekretario de TEC; H. Tonkin, prezidanto de UEA; C. Stop-Bowitz, prezidanto de ISAE; W. Bormann, sekretario de Akademio de Esperanto (AdE); M. Landmark, psikologo; D. Blanke, estrarano de CED.
Proksimuma nombro de ĉeestantoj: 90.

La konferenĝon malfermis prof. Tonkin. Li publike proklamis la fondon de TEC lau decido de UEA-Komitato. Pri la celoj, gvidstrukturo kaj problemoj de TEC parolis W. Blanke. Plue parolis J. Pospíšil pri Laborplano de Normiga Sekcio, I. Bujdosoj pri ĉefaj taskoj de sekretario kaj W. Blanke prezentis la TEC-komitaton.

El la diskuto, kiun gvidis J. Pospíšil, ni menciis:

W. Bormann alparolas flanke de AdE. TEC estas sur bona vojo, pluraj akademianoj jam envolviĝis en la laboron. Krom la tradicia sekcio Faka Vortaro la Akademio starigis specialan Komisionon pri Aprobo de Fakaj Vortaroj.

H. Tonkin: la laboro de TEC helpas al CED. TEC kaj CED estas "frataj sekcioj".

C. Stop-Bowitz: estas tute natura afero ĉiel kunlabori. Kiel gvidanto de la Akademia Komisiono substrekas, ke tiu konsideros terminarojn nur el vidpunkto de fundamenteco.

T. Witkam: DLT sukcesos nur, se Esperanto-terminologio sufiĉe rapide atingos nivelon kompareblan kun naciaj lingvoj. Estas multe pli komplike kaj multekoste aldoni novan fakterenon al la funkcia-ta sistemo ol novan lingvon. Intima rilato inter Esperanto kaj Artafarita Inteligento (AI). Gojas pri "skemisma" vojo: pli tanga por AI. Financa sojlo por eldonado malaltiĝadas: privata komputilo estas "eldonejo". Necesas kunlabori kun multlingvaj terminologiaj projektoj.

(Lau la TEC-BULTENO n-ro 1/1988)

Biografio de profesoro JONAS DAGYS, membro de UEA

Jonas Dagys naskiĝis 11.10.1906 en vilaĝo Kadaraj, distrikto Biržai (Birĵaj), Litovio.

Mezlernejon li vizitis en Biržai en la jaroj 1918 - 1925. Internacian lingvon Esperanto li lernis en 1923 (instruisto estis L. Alseika). En la jaroj 1925 - 1930 li studis biologion en universitato Kaunas (Litovio). Post absolvo li estis akceptita labori en Kabineto de anatomio kaj fiziologio de plantoj en la sama universitato. En 1933 - 1935 li estis sendita kun stipendio al Instituto de plantfiziologio en Graz (Austrio), kie sub gvidado de profesoro K. Linsbauer li esploris dinamikon de kreskosubstancoj en burĝonoj, folioj kaj printempa suko de betulo, preparis disertacion kaj ricevis doktoran gradon de filozofio.

Reveninte al Kaunas li fariĝis asistanto de botanika katedro. En 1938-1939 li laboris kiel stipendiulo en Utreĥta universitato (Nederlando) kaj Karlsberga Laboratorio (Danlando) por profundigi sian kvalifikon en biokemio kaj mikrobiologio. En 1939 li fariĝis asistanto por plantfiziologio en Kaunasa universitato. Ekde 1940 li estis direktoro de katedro por anatomio kaj fiziologio de plantoj, docento en Vilnusa universita-



to, ekde 1945 profesoro kaj inter 1953 - 1980 prezidanto de Litova botanika societo. Li esploris herbejojn apud rivero Apaŝcia, osmoson de radikoj, efikon de fitohormonoj, mikroelementoj al kreskado de fecoj kaj superaj plantoj, fitocidojn, ilian utiligon en lukto kontraŭ malsanoj, ekologion de marbordaj plantoj. Li verkis kelkajn lernolibrojn por superaj lernejoj - pri anatomio de plantoj, ekologio de plantoj, fiziologio de plantoj (kun aliaj aŭtoroj), redaktis litovan botanikan vortaron (1938) kaj vortaron de botanikaj terminoj (1965), redaktis eldonaĵon "Lietuvos flora" (Litova flaura, 1955 - 1980).

Malgrau sia scienca agado laborema sciencisto Jonas Dagys partoprenis kaj evoluigis la Esperanto-movadon. Kiel esperantisto li estis membro de Litova Esperanto-Societo en Kaunas (1931 - 1939), ekde 1926 li estis membro de Sennacieca Asocio Tutmonda. Pasintjare li estis elektita kiel plenrajta membro de Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino.

Li kunlaboris en gazeto "Sennaciulo", nun li kunlaboras en revuoj "Scienca Revuo" kaj "Esperanto" pri botanikaj demandoj. En la Vilnusa universitato li gvidis Esperantajn kursojn. En la tradiciaj tendaroj de ĉaltiaj esperantistoj la partoprenantoj auskultis liajn prelegojn laŭ la temo "Plantoj de la Balta marbordo".

Dum lasta tempo Jonas Dagys multe laboris pri Litova-Rusa-Latina-Esperanta botanika vortaro.

Malgrau sia malbona sanstato li aktive partoprenas aranĝojn de la Vilnusa E-Klubo.

La sovetia registaro altgrade taksis lian sciencon agadon. Prezidiumo de Supera Soveto de Litova SSR premiis lin per kvar honoraj atestoj.

En la nomo de ĉiuj esperantistoj ni sincere gratulas la honoran profesoron kaj deziras al li bonan sanon kaj prosperon en ĉiuj sferoj de lia agado.

Vytautas Slėnys

Ankorau "Abunde kaj redunde".

Ĉi-foje alikaŭze: en Starto 2/88 p. 2 kaj 4 aperis pretervidoj:

S-ro Josef Rumler reagas kelkfoje al mia kritiko per vortoj, ke mi klasifikas lin kiel "nepran komencanton". Li "forgesis" elskribi el mia kritiko, ke mi diris: "... kiel movadano li estas nepra komencanto." Sur tio li bazas sian instruon al mi, ke mi "naive kritikis" kaj sendas min en lernejon al Kalocsay. Sed tiun mi studis jam antaŭ kvindek jaroj kaj ĉar s-ro Rumler ellasis la vortojn "kiel movadano", liaj mokaj vortoj pri mi staras kiel ulo sur argilaj kruroj. Mi ankaŭ skribis /p. 10/: "Josef Rumler estas bona poeto kaj scianto de la lingvo..." Tiuj vortoj certe ne estas "naiva kritiko".

Ankaŭ al mi okazis pretervido. Denove mi prenis en manojn la broŝuron "Abunde kaj redunde" kaj sur p. 7 mi trovis mencion pri la Neologisma glosaro. Tial mia riproĉo al s-ro Rumler koncerne neindikon de tiu fonto estas nevalida kaj mi petas pardonon. Rilatas la tekston sur p. 4 de la sama Starto kaj tiu ĉi korekto modifas la ceteran sencan de miaj vortoj pri la afero.

Adolf Stanura

Ĉu vortoj niko = nikeo hejmiĝis en Esperanto

En faka literaturo de kiu ajn lingvo etna eblas lasttempe trovi la vorton, ekz.: en angla: niche, en ĉeĥa: nika, en franca: niche, en germana: Nische, en rusa: niša, en slovaka: nika, kiuj iĝis homonima al do, ni pli volonte komencu de komenco!

La vorto en etnaj lingvoj uzata devenas el itala vorto niccia /: esperante: niĉo kaj tiel ĝin prezentas ankaŭ PIV sur paĝo 737:/, kiu indikas kavaĵon en muro aŭ en konstruo, destinita por loki statuon, fornon aŭ alian objekton. La itala mem ĝin derivis el latina "nidus" /: diminutive: nidiculus :/ - Eblas, ke al formado de la latina vorto influis la helena, ĉar en niĉoj de helenoj situis statuoj de diino Nike - kiu estis diino de venko, kaj pri Ŝi la helenoj kredis, ke Ŝi donas al ili venkon en art-aŭ en sport-konkursoj.

Kio okazis plu:

La etnaj lingvoj, laŭ angla maniero, la vorton, origine indikantan nur la kavaĵon en la muro aŭ konstruo, destinita por loki statuon, fornon aŭ alian objekton, komencis uzadi ankaŭ homonime:

- a/ por indiki la vivmedion, kiu liveras faktorojn, kiuj estas necesaj por ekzisto de la organismo aŭ de la specio;
- b/ por indiki la lokon, okupon aŭ agadon, por kiu estas certa unuopulo plej bone dotita;
- c/ por indiki la ekologian manieron de la organismo en komuno, aparte en la rilato al konsumado de la nutraĵo.

La etnaj lingvoj la vorton uzadas homonime ekz. en ekologio, kie per ĝi estas indikata la vivmedio, kiu kontentigas la bezonon de certa grupo de specioj aŭ nur bezonon de unu specio; sed la kompilanto proponas fari diferencon inter la vortoj niko kaj nikeo = nikeo, ekz.:

1. La koalo /Phascolartos cinereus/, kiu estas orientaŭstralia mamulo el la ordo marsupijuloj, simila al malgranda ŭrso, estas limigita al niko /aŭ nikeo/ de certa specio de eŭkajptoj.
2. La pando granda, kies ekzisto estas limigita al niko /aŭ nikeo/ de altmontaraj kreskaĵoj bambuaj

La vorto "niko" estas derivita el latina vorto, kaj "nikeo" el vorto helena.

La kompilanto de la artikolo alvokas ĉiujn esperantistojn, por ke ili gardu nian lingvon kontraŭ influadoj el kiu ajn lingvo nacia, plejparte kontraŭ "homonimigado", kiu tuŝus la fundamenton de nia lingvo, por ke Esperanto ne disfalu en dialektojn angloesperanto, germanesperanto, ĉeĥesperanto ktp./.

Antonín Bombionka

Kio estas Nova Biologia Nomenklatur?

En la jaro 1971 estis en Belgio fondita Asocio por la Enkonduko de Nova Biologia Nomenklatur. Ĝia iniciatinto estas d-ro Wim M.A. De Smet, docento pri zoologio de universitato en Antverpeno, fakulo pri cetacoj, ĝisnuna prezidanto de la asocio. Ideo de nova biologia nomenklatur estas lia ideo. Sidejo de la asocio estas en urbo Kalmthout, ĝiaj laboraj lingvoj estas jenaj kvar lingvoj: la nederlanda, la franca, la angla kaj Esperanto. La 28-an de novembro 1987 havis la asocio 292 membrojn /personojn kaj societojn/ en pli ol 40 landoj. En Ĉeĥoslovakio estis kvar membroj, sed unu mortis kaj unu estas indikata kiel ne-aganta membro.

Membreco en la asocio estas dumviva, se la membro mem ne decidus retirigi el la asocio /ĝis nun tion faris nur unu membro/. La 12-an de januaro 1986 la asocio transformiĝis en oficialan institucion laŭ belga juro. Sed kategorio de oficialaj membroj enhavas nur malmulte da personoj, ĉar oficialaj membroj devas pagi jarkotizon 200 belgajn frankojn. Konforme al la en Belgio registrita statuto minimume duono de la membroj devas esti de belga nacieco. Oficiala asocio estis fondita de sep membroj. En la daŭro de la jaro 1986 envenis kvar pliaj. La estrarkunsido de la 28-a de novembro 1987 akceptis por jaro 1988 entute 17 oficialajn membrojn, inter kiuj estas ankaŭ mi, ĉar mian jarkotizon pagis la prezidanto, d-ro De Smet.

Vorto "Enkonduko" en la nomo de la asocio estis en la jaro 1971 "muziko de la estonteco", ĉar ankoraŭ ekzistis neniu nova nomenklatur, do oni povis enkonduki nenion. Oni eĉ ne povis krei la nomenklaturon, ĉar unua tasko estis kreado, diskutado kaj aprobo de reguloj de nova biologia nomenklatur. Menciita laboro daŭris 14 jarojn. En la jaro 1985 estis aprobita fina formo de detala 50-artikola regularo.

Poste komenciĝis proponado kaj aprobadado de NBN-nomoj. Proponataj nomoj devas konveni al reguloj, sed eĉ en tiu kazo ili povas malplaci al iuj aprobantoj. Estis kreitaj tripersonaj komisionoj por aprobadado de certaj grupoj de NBN-nomoj. Mi estis membro de du komisionoj. En komisiono, kiu aprobis nomojn de ĉiuj ordoj de mamuloj, estis kun mi s-ro Adriaan Peeraer /Nederlando/ kaj s-ino Hilda Kriekemans /Belgio/. En komisiono, kiu aprobis nomojn de ĉiuj familioj kaj ambau subordoj de primatoj, estis kun mi ankaŭ s-ro Peeraer kaj s-ro José Jacob /Belgio/. Ĝis nun estis aprobitaj 219 NBN-nomoj.

Kia estas NBN? Por kompreni ĝian sistemon estas necesa trastudi almenaŭ ĉefan parton de la regularo. En ĉi tiu konciza informo mi ne povas citi la regulojn. Ĝenerale oni povas diri, ke kompare al nuntempa biologia nomenklatur, NBN estas pli simpla. La simpleco estas ĝia avantaĝo, kvankam ĝi ne estas tute senproblema, ĉar simpligo ofte kausas aliflankajn komplikojn. Plenumi ĉiujn regulojn povas esti en iuj kazoj eĉ "kolrompa".

Antaŭparolo de NBN-regularo komencas per jena frazo: "La Nova Biologia Nomenklatur /N.B.N./ estas sistemo, per kiu oni faras nomojn de animaloj kaj plantoj laŭ difinitaj reguloj kaj uzante

la internacian lingvon Esperanto." Plue mi citas lastan alineon de menciita antaŭparolo:

"La reguloj do donas nur ideon pri la Nova Biologia Nomenklaturato. Sed certe tiu ideo entuziasmigas multajn, kiuj esperas ke iam ekzistos pli logika kaj pli konforma nomenklaturato ol la nuna. Krome plaĉas al multaj personoj ke la lingvo Esperanto estas uzata por tiu promesplena perspektivo. Ĉiuj tiuj personoj estas bonvenaj en la Asocio por la Enkonduko de la Nova Biologia Nomenklaturato /adreso: Hertendreef 12, B-2180 Kalmthout, Belgio/."

Ankoraŭ tria citaĵo /el aldonaĵoj post ero 1 de la regularo/:

"La Nova Biologia Nomenklaturato havas la avantaĝon ne esti ĝenata per la multnombraj neperfektaĵoj, komplikaj, kapricaĵoj kaj nesencajĵoj de la nun ekzistantaj latindevenaj zoologia kaj botanika nomenklaturaj."

NBN enhavas jenajn taksonojn: regno, filumo, klaso, ordo, familio kaj specio. Pluraj specioj havas subspeciojn, iuj ordoj havas subordojn. Nomoj de subspecioj estas trivortaj, de specioj duvortaj, de ceteraj taksonoj unuvortaj. Genro kaj subgenro estas indikataj nur per unuopaj literoj kaj ciferoj. Subtaksonoj /krom la subordo kaj subspecio/ estas indikataj per la vorto "sub" ligata per streketo al la nomo de la taksono; al tiu vorto sekvas majuskla litero por indiki la sinsekvon de la diversaj subtaksonoj. Supretaksono estas indikata per la vorto "supre" ligata per streketo al la nomo de la certa taksono el la aro da taksonoj, kiujn ni grupigas en tiu supretaksono. La certa taksono estas tiu, kiu enhavas plej multe da taksonoj de malpli alta nivelo.

En ĉiu familio, subordo, ordo, klaso, filumo kaj regno ekzistas specio, kiu estas la tipa specio de tiu taksono. Tiu specio havas la atributon "familitipa", "subordotipa", "ordotipa", "klasotipa", "filumtipa" aŭ "regnotipa" kiel dua vorto de sia NBN-nomo. Inter la eventualaj subspecioj unu estas la tipa subspecio kaj havas la atributon "tipregiona" kiel tria vorto de sia NBN-nomo. Ĉiuj NBN-tipspecioj de regnotipa ĝis subordotipa estas NBN-tipspecioj por ĉiuj malpli altaj taksonomiaj niveloj, al kiuj ili apartenas.

Por decidi ĉu iu specio meritas esti la NBN-tipo servas jenaj kriterioj, kiuj havas sinsekvon gravecon:

1. dispersiĝo de la specio sur la terglobo /ankaŭ kiel bredita specio/,
2. adaptiĝeco al pluraj vivmedioj,
3. multnombreco,
4. nuntempa konateco,
5. globala multnombreco de specimenoj en sciencaj kolektoj,
6. konvena volumena formo de la specio kompare kun aliaj.

Menciitajn regulojn oni pli bone komprenos laŭ ekzemploj: NBN-tipspecio de planta regno estas maizo, kies NBN-nomo estas Maizo regnotipa /Zea mays, kukuŝice setá/, do NBN-nomo de la regno estas Maizoregnaĵoj /Plantae, rostliny/. El animaloj plenumas kri-

ĈAPITROJ PRI LA SINDEFENDO

© Ing. Ivan Špička kaj Ing. Jindřich Novák, 1987

estis pli ofta interligitaj kun la respektiva signalo, kaj tio estas ĉe la sportisto la sportaj reagoj. La boksisto tial batalas plej ofte kvazaŭ lia kontraŭulo ne aplikus kikojn, la ĵudisto kvazaŭ lia kontraŭulo ne uzadus frapojn, la karateisto kvazaŭ li po-
entvenku sian kontraŭulon sen frapi lin k.s.

Simile diferencas en sporto kaj en sindefendo la kondiĉoj de interbatalo. La sindefendo-situacio povas komenciĝi ie ajn kaj iam ajn, sed por sporta matĉo sportistoj pretigas sin kun atento pri ĝia fiksa dato. La sporta batalo okazas en la medioj, kiuj estas por tiu ĉi celo speciale preparitaj, la sportisto ilin intime konas; plue, li estas protektata fare de atentema ĵuĝisto, kiu, kromalie, prizorgas, ke la sportistoj faru nenion, kio povus danĝerigi al ilia sano. Tial en la sporta batalo povas venki eĉ vundita batalanto, kiun vundis kontraŭulo, krude malobservante sportajn regulojn. Tio estas en la sindefendo-situacio absurda. La sindefendo-situacio povas esti en diversaj specoj de tereno, tage, nokte, kontraŭulo povas apliki libervolan insidon, kiun li kapablas elpensi k.t.p. La rezulton de la batalo ne determinas laŭ sportaj reguloj ĵuĝisto, sed la fakto, ke unu aŭ la alia batalanto ne povas daŭrigi la batalon.

Ĉu estas imagebla homo, kiu scius bonege la sindefendon kaj malgraŭ tio ne estus bona karateisto, ĵudisto aŭ boksisto? Certe jes. Tiu, kiu scius kaj scipovus ekzemple la enhavon de tiu ĉi libro kaj se li, krome, kapablas apliki tion rilate al sia mensa stato, certe povus almenaŭ teni en konvenaj limoj la plimulton de eĉ tre bonaj sportistoj, kiuj praktikas la menciitajn batal sportojn. Kaj ĉi-loke ni parolas pri komencanto en studado de la sindefendo! Ni ne diras tion por malaltigi la prestiĝon de tiuj ĉi sportaj branĉoj; tamen estas utile konscii, kie estas ties naturaj limoj kaj fine, kiaspekaj estas ankoraŭ la celoj de tiuj ĉi batal-
sportoj. Hodiaŭ eble neniu supozas, ke lancisto lernas ĵetadi lancon por defendi sin en la sindefendo-situacioj, ke kuristo trejnas kuron por fuĝi de siaj malamikoj k.t.p. En la opinioj pri la batal sportoj mirinde transvivas analogaj sensencaĵoj, eĉ inter la sportistoj mem. Ĉu tio signifas, ke tiuj ĉi sport-branĉoj havas nenian signifon por praktikado de sindefendo? Tio ne estas kategorie asertebla. Ili sendube donas certan gradon de korpa perfektigo kaj la studento praktikante ilin lernas kelkajn elementojn, kiujn li povas uzi solvante iujn ne tre malfacilajn sindefendo-situaciojn. Se oni ne forgesadus la apartaĵojn de la sindefendo, tiuj ĉi sportoj povus servi - ĝis certaj limoj - kiel taŭga sinpreparo por propra studado de la sindefendo. Fine tamen venas la momento, kiam la sindefendo kaj la sporto definitive disiras kaj eĉ kontraŭstaras reciproke. Poste la sporta ap-

liko de la batalagoj detruas iliajn kvalitojn por solvado de la sindefendo-situacioj kaj male, studado de la sindefendo malebligas al interesato plibonigi sin en la respektivaj batalsportoj.

4.2. Ofteco de la sindefendo-situacioj (31 linioj)

4.3. Mensa sinpreparo

En la klasikaj batalkompleksoj, kiel la juĵucuo, kendo, karateo k.t.p., oni dediĉis grandan atenton al la mensa sinpreparo. Kion ni komprenas sub tiu ĉi termino? Mallonge oni povas diri proksimume jenon: en la sindefendo-situacioj aperas ĉe la partoprenantoj ne sole ellernitaj agoj, sed ankaŭ instinktaj defendreakcioj, kiuj povas kaŭzi, ke oni ne povas apliki la akiritajn sciigojn kaj scipovojn en la praktiko. Tiuj ankaŭ plilongigas la reago-tempon, kio memkomprene estas nedezirinda. Krome, rilate la influon de emociaj statoj (timo, kolero, ... k.t.p.) malaltiĝas ĉe la batalantoj la konkludopovo. Japanaj kaj ĉinaj majstroj de batalarto ĝis en la pasinteco relative perfektan procedon de la mensa sinpreparo de homo por solvi konfliktajn situaciojn, uzante metodojn de la Budhisma sekto ZENO. Ilia enhavo estas ĉefe certaj metodoj de sinidentigo kaj difino de sia rilato al la ĉirkaŭaĵo, t.e. nuligo de ajna dualismo. Interesa parto de ilia ekzercigado estis uzado de t.n. KOANOj. Unu el la pli ol iom konataj estas ekzemple jena: "Se plaŭdfrapas unu manplato la alian, oni aŭdas plaŭdon. Tamen kion oni aŭdas, se plaŭdfrapas nur unu manplato?" Klaras, ke tiu ĉi problemo ne estas solvebla racie, alie la respondo estus banala. Malgraŭ tio, ĉi tiu koano havas solvon, kaj eĉ senfinan nombron da solvoj, kiuj estas diferencaj por diversaj subjektoj. Sed la solvo estas rezulto de la spirit-enrigardo (introspekto) kaj ĝi havas karakteron de aktuala psiĥa stato, do ne de provebla eldiro.

Tamen tiuj ĉi metodoj estas pro multaj motivoj neakcepteblaj. Krome, ili estas en niaj kondiĉoj nepraktikeblaj. Por la majstre konceptata ekzerc(ig)ado ni aplikas scienca mensan sinpreparon de la monosignala sindefendo. Sed kion oni povas fari, se oni ne havas tempon kaj eĉ intereson okupiĝi pri la sindefendo vere funde, kaj malgraŭ tio oni bezonas ellerni ankaŭ mensan solvodon de iuj ne tre malfacilaj situacioj, en kiuj staros kontraŭ oni finfine ankaŭ nura laiko? Ĉu eblas iel plialtigi sian ŝancon venki? Ni povas respondi jese. Sed eĉ poste oni ne evitos relative grandan strebadojn kaj ne ĉiu atingos kontentigajn rezultojn.

Antaŭ ĉio necesas ree pripensadi sian ĉiutagan agadon. Tial ni ĉiutage meditu, kio dumtage ekscitis aŭ ĝojigis nin, kial ni ekkoleras aŭ ektimis, kiel ni povis malebligi estiĝon de tiu aŭ alia situacio aŭ solvi ĝin k.t.p. Post iu tempo ni alkitimigos pri ĵugi situaciojn aposteriore pli trankvile kaj racie. Pojome ni ekkonscii niajn emociajn statojn ankaŭ dumtage. Dume ni ne influas la evoluon de niaj psiĥaj statoj. Cetere, ni ne sukcesus tion fari. Nur post sufiĉe longa tempo ni komencus solvi niajn problemojn apriore, pli racie kaj malpli

spontane. Nun venas la tempo, kiam ni komencas revizii skalon de niaj valoroj, ni meditas pli ofte, kial ni faras tion aŭ ion kaj al kiuj konsekvencoj kondukas nia agado. Ni provos eviti situaciojn, kiuj estus malfacile solveblaj, eventuale nepre nesolveblaj. Post iom da tempo ni klopodos identigi la situaciojn, en kiuj ni povus agi neoportune, kaj ni pretigas nin por ties solvado. Tio estas utila ne sole en la sindefendaj, sed ankaŭ en aliaj vivsituacioj, personaj konfliktoj k.t.p.

La supre skizitaj konsiloj ankoraŭ ne estas mensa sinekzercado, ili estas nura sinpreparo, kiun trapasu ĉiu, kiu volas konduki kulture. Rilate al la ŝanco venki kontraŭulon en sindefendo-situacio, nepre pli grandan venko-probablon havas emocie disciplinita, inteligenta kaj konvene pretigita homo ol tiu, kiu estas emocie labila, malmulte inteligenta kaj spontane batalanta. En la reduktita kurso temas en la psiĥa sfero pri tio, ellerni agi almenaŭ a posteriori kritike, almenaŭ parte forigi la timon vundi kontraŭulon (ĉi tie ĉefe per tiu aposteriora analizo).

La unua grado de la mensa sinpreparo - la kvazaŭsignala - ne apartenas plu en la reduktitan kurson de la sindefendo kaj tial ni karakterizos ĝin tre koncize.

Temas pri pli aŭ malpli granda mezuro de laŭcela saturado de konscie kontrolata parto de la mensa-kapacito (t.e. konscio) per difinitaj enhavoj en la sindefendo-situacio. Introspekte oni povas identigi psiĥan agadon kiel seniterrompan fluon de enhav-tutaĵoj. Tiuj ĉi tutaĵoj elmergiĝas kiel donitaĵo. Ni ne scias, kaj ne povas scii, kial post la tutaĵo A venis la tutaĵo B, ni tion iufoje nur "ex post" konjektas, tiel, ke nia ĉiutaga konscia estado estas nur reago je la donitaĵoj, ĝi do estas kvazaŭsignala. Fonto de tiuj ĉi donitaĵoj, do tiu ĉi subkonscia saturado de la konscio per mensaj enhavoj, havas la bazon de afekcia karaktero. La sperto montras, ke kutimo, sinekzercado, la entuziasmo aŭ foje eĉ pensado povas, en certaj limoj, influu la karakteron de tiuj ĉi konsciataj enhav-tutaĵoj. La kvazaŭsignalaj metodoj de la mensa sinpreparo (inter ilin apartenas joko, jezuita spirita sinpreparo, Freŭda psiĥanalizo, diversaj metodoj por "irilavado de la cerbo" - brain washing - k.s.) estas bazitaj sur konscia uzado de tiuj ĉi spertoj. Per ili oni ankaŭ klarigas tiajn fenomenojn kia estas indiferenteco de Kristanaj martiroj kontraŭ doloron. Tiuj ĉi homoj sukcesis spontane saturi sian konscion per entuziasmaj sentoj kaj imagoj tiel, ke ili sentis neniun doloron.

La kvazaŭsignalaj metodoj de la mensa sinpreparo fiaskas ĉie, kie la solvado de la situacio postulas uzon de la intelekto. Sukcese oni nome povas malsaturi kaj saturi sian menson (t.e. anstataŭigi ties nedezirindan enhavon per la dezirinda) sole per enhavoj laŭspece afinaj, do senton per sento, imagon per imago. Krome, tiu ĉi anstataŭigado de sento per sento (ekzemple per fanatismo) estas procedo relative malrapida rilate al la tempo, pri kiu oni disponas por la solvo de konkreta sindefendo-situacio.

Pri la multsignalna mensa sinpreparo okupiĝas la verkoj (9) kaj (27). Ni povas diri, ke sole kelkaj altgradaj majstroj de japanaj kaj ĉinaj batalartoj atingis intuician komprenon de tiu ĉi grado de la mensa sinpreparo per metodoj de la zen-budhismo.

Surbaze de la monosignalna teorio estis eble klarigi tiujn ĉi metodojn kiel manierojn, celantajn identigi inter-

rompo-havan fluon de psiĥo-enhavoj ne kiel donitaĵon, sed kiel eb-
lon. Ne sufiĉas do nedezirindajn enhavojn de la konscio forigi per
ties saturado per enhavoj dezirindaj.

Tiu ĉi aludon de la problemaro ni enkondukis tial, ke lasta-
tempe estas mode paroli kaj skribi pri mensa sinpreparo, ĉefe pri
la metodoj de la ĵogo, kaj tiujn ĉi metodojn oni ofte konfuzas kun
manieroj de la psiĥa aŭ korpa higieno.

4.4. Resumo

En tiu ĉi ĉapitro, kiu estas esenco de la traktita temo, ni
resumas, kion necesas kompreni, koni kaj scipovi por pligrandigi
sian esperon venki, solvante la sindefendo-situaciojn en batalo
kontraŭ laikon.

(Ĉi-loke ni ellasas: 98 liniojn).

4.5. Epilogo

Ni klopodis sur kelkaj paĝoj konigi al legantoj la minimumon
da scioj kaj scipovoj, kiuj povas tre plialtigi la ŝancon de bata-
lanto venki en interbatalo laikon. Tiuj ĉi metodoj memkomprene va-
lidas nenion en la batalo kontraŭ iun, kiu funde scipovas la sin-
defendon. Ĝis nun neniu libro batal-venkis anstataŭ sia posedanto.
La priskribitajn metodojn oni devas bone ellerni, estas necese e-
duki sin al pli granda energieco, kuraĝo kaj la racia solvado kaj
produktado de la viv-situacioj; ĉi tie ne havas lokon emocioj kiel
timo, kolero, antaŭtimo, angoro, ĝojo, Se ni parolas metafo-
re, ne sufiĉas do sole scii kaj scipovi, estas necese havi ankaŭ
"animon de batalanto"

Por tiu, kiu volus, studante la sindefendon, atingi pli gran-
dajn rezultojn, estas necese havi antaŭ ĉio solidan sperton en la
klasika ĵuĵucuo aŭ en la karateo (plej bone en la ĉeĥa speco de la
karateo nomita BRANAO), kiel ni jam diris. Nuntempe estas plej fa-
cile prepari sin por studado de la sindefendo helpe de la karateo
(aŭ branao). La lastatempa sporta ĵudo estas jam tro malproksimi-
ginta for de la solvado de la sindefendo-situacioj kaj ĝia kontri-
buaĵo al la lernado de la sindefendo estas tial relative malgran-
da. Nur poste oni povas alpaŝi la studadon de la monosignala sin-
defendo, kiu donas instrukcion, kiel venki kontraŭulon en la ĝe-
nerala sindefendo-situacio. Sur la paĝoj XX kaj XY estas refe-
rencoj al la verkoj, en kiuj oni povas akiri bezonajn informojn.

Kion diri fine? Eble la plej bona finigo de tiu ĉi libro estas
klasika, iom parafrazita, interparolo inter majstro kaj disĉiplo,
kiu venis ellerni laŭeble plej baldaŭ skermi.

Disĉiplo: "Majstro, mi bezonas ellerni laŭeble plej baldaŭ skermi.
Dum kiom da tempo vi povus pleninstrui min pri tio?"

Majstro: "En kvin jaroj!"

Disĉiplo: "Pardonu, sed vi eble ne komprenis min ĝuste. Mi
bezonas ellerni la skermadon laŭeble plej baldaŭ por ke mi

teriojn por tipspecio kompreneble la homo. Sed ĉar homoj kreis ankaŭ homan socion, estis por homo kiel animalo /biologia objekto/ elektita nomo "antropo". Do la homo estas Antropo regnotipa /Homo sapiens, člověk moudrý/ kaj animaloj estas Antroporegnotipoj /Animalia, živočichové/. Antropo regnotipa estas tipspecio ankaŭ por filumo de ĥorduloj - Antropofilumanoj /Chordata, strunatci/, klaso de mamuloj - Antropoklasanoj /Mammalia, savci/, ordo de primatoj - Antropordanoj /Primates, primáti - nehetnatci/, subordo de simioj - Faciantropordanoj /Simiae - Anthropoidea, vyšší primáti/ kaj familio de homoj - Antropoj /Hominidae, hominidi/.

Pliaj ekzemploj de NBN-nomoj de taksonoj kaj iliaj tipspecioj:

Amebofilumanoj /Protozoa, prvoči/
 Amebo filumtipa /Amoeba proteus, měnavka velká/
 Abelfilumanoj /Arthropoda, členovci/
 Abelo filumtipa /Apis mellifera, včela medonosná/
 Helikofilumanoj /Mollusca, měkkýši/
 Heliko filumtipa /Helix pomatia, hlemýžď zahradní/
 Salpoklasanoj /Thaliacea, salpy/
 Salpo klasotipa /Salpa maxima, salpa velká/
 Ranklasanoj /Amphibia, obojživelníci/
 Rano klasotipa /Rana temporaria, skokan hnědý/
 Lacertoklasanoj /Reptilia, plazi/
 Lacerto klasotipa /Lacerta agilis, ještěrka obecná/
 Erinacordanoj /Insectivora, hmyzožravci/
 Erinaco ordotipa /Erinaceus europaeus, ježek západní/
 Kuniklordanoj /Lagomorpha, zajáci/
 Kuniklo ordotipa /Oryctolagus cuniculus, králík divoký/
 Ratordanoj /Rodentia, hlodavci/
 Rato ordotipa /Rattus norvegicus, potkan/
 Hundordanoj /Carnivora, šelmy/
 Hundo ordotipa /Canis familiaris, pes domácí/
 Ĉevalordanoj /Perissodactyla, lichokopytníci/
 Ĉevalo ordotipa /Equus caballus, kůň domácí/
 Bovordanoj /Artiodactyla, sudokopytníci/
 Bovo ordotipa /Bos taurus, tur domácí/

Kaj ankoraŭ subordoj kaj familioj kaj iliaj tipspecioj de primatoj:

Ordo: Antropordanoj /Primates, primáti/
 Subordo: Muzelantropordanoj /Prosimiae, poloopice/
 Familio: Makioj /Lemuridae, lemurovití/
 Tipspecio: Makio subordotipa /Lemur catta, lemur kata/
 Familio: Palmpiedmakioj /Indriidae, indriovití/
 Tipspecio: Palmpiedmakio familitipa /Indri indri, indri/
 Familio: Fingromakioj /Daubentonidae, ksukolovití/
 Tipspecio: Fingromakio familitipa /Daubentonia madagascariensis, ksukol/
 Familio: Premmakioj /Lorisidae, outloĥovití/
 Tipspecio: Premmakio familitipa /Galago senegalensis, komba ušatá/
 Familio: Okulmakioj /Tarsiidae, nártounovití/
 Tipspecio: Okulmakio familitipa /Tarsius syrichta, nártoun filipínský/

Subordo: Faciantropordanoj /Simiae - Anthropoidea, vyŝŝi primátí/
 Familio: Pupantropoj /Callithricidae, kosmanovití/
 Tipspecio: Pupantropo familitipa /Callithrix jacchus,
 kosman bĕlovousý/
 Familio: Pendantropoj /Cebidae, malpovití/
 Tipspecio: Pendantropo familitipa /Cebus capucinus,
 malpa kapucínská/
 Familio: Abajantropoj /Cercopithecidae, koĉkodanovití/
 Tipspecio: Abajantropo familitipa /Macaca mulatta, rhesus/
 Familio: Svingantropoj /Hylobatidae, gibbonovití/
 Tipspecio: Svingantropo familitipa /Hylobates hoolock,
 gibbon hulok/
 Familio: Lertantropoj /Pongidae, lidoopovití/
 Tipspecio: Lertantropo familitipa /Pan troglodytes,
 ŝimpanz/
 Familio: Antropoj /Hominidae, hominidí/
 Tipspecio: Antropo regnotipa /Homo sapiens, ĉlovĕk moudrý/

Pli simpla estas situacio en la ordo de elefantoj. Ĝi enhavas unusolan familion kun nuraĵ du specioj, el kiuj unu havas kvar sub-speciojn kaj la dua havas tri sub-speciojn. Jen kompleta taksonomio de la menciita ordo:

Ordo: Elefantordanoj /Proboscidea, chobotnatci/
 Familio: Elefantoj /Elephantidae, slonovití/
 Specio: Elefanto ordotipa /Elephas maximus, slon indický/
 Subspecioj: Elefanto ordotipa tipregiona /Elephas maximus bengalensis, slon bengálský/
 Elefanto ordotipa cejlona /Elephas maximus maximus, slon cejlonský/
 Elefanto ordotipa indonezia /Elephas maximus sumatranus, slon sumaterský/
 Elefanto ordotipa sudorientazia /Elephas maximus hirsutus, slon malaĵský/
 Specio: Elefanto grandorela /Loxodonta africana, slon africký/
 Subspecioj: Elefanto grandorela tipregiona /Loxodonta africana cyclotis, slon pralesní/
 Elefanto grandorela orientafrika /Loxodonta africana oxyotis, slon stepní/
 Elefanto grandorela sudafrika /Loxodonta africana africana, slon jihoafrický/

En prezentitaj ekzemploj oni povas vidi, ke NBN estas fakte pli simpla kaj pli logika ol la nuntempa nomenklaturo. Ĝi estas nur nekutima, kiel ĉio nova. Se iu deziras specialajn aŭ pli detalajn informojn pri NBN, mi estas kompleza liveri ilin /se mi ilin konas/.

Ne ĉiuj biologoj konsentas kun NBN. Koncerne neesperantistojn tio estas klara: ili ne konsentas kun la fakto, ke ĝi uzas Esperanton. Sed ankaŭ inter biologoj - esperantistoj estas nekonsentantoj.

Ankaŭ tio estas komprenebla, ĉar ili en sia laboro uzas nuntempan nomenklaturon, kiun ili jam havas "en la sango" kaj ĝia sistemo estas por ili tute memkomprenebla. Tial al ili ŝajnas NBN stranga aŭ eĉ malbona. Ili ne kredas, ke pli simpla sistemo povus bone servi por ĉiuj iliaj bezonoj. Sed pluraj simpatias kun NBN kaj prijuĝas ĝin progreska kaj tial bona kaj utila. Ili estas pioniroj de progreso en biologio.

(Lubomír Středa)

MALLONGE...

La revuo **TYPOGRAFIA**, 10/1987, Praha, enhavas longan, dupagan artikolon de Ota Kořínek pri Esperanto, kun aro da informoj kaj kun fotoj, en pozitiva senco. Sed mirigas la fino, kvazaŭ "ĵurnalistita anaso": laŭ ĝi, el Praha venas propono forigi en Esperanto la supersignojn, kaj la UK en Varsovio 1987 traktis pri diversaj proponoj reformi Esperanton!

/J.M./

Esperanto en "Domino", la porinfana elsendo de Radio Praha, 22-an de februaro 1988: kantis la Esp-rondeto en Netolice "Talina lago", sekvis intervjuo kun la esperantista familio de RNDr. Josef Kavka, CSc., en Praha.

/J.M./

Benina Esperanto-Asocio festis Zamenhof-Tagon 1987 per arango en la urbo Cotonou, kadre de kiu oni ankaŭ akceptis novajn membrojn por 1988. Inter tiuj (entute 21) surlokaĵ aligintoj troviĝas universitataj instruistoj pri la angla kaj germana, poŝta inspektoro kaj direktoro de mezgranda lernejo, kio montras la kreskantan akcepton en Benino de Esperanto kiel kultura-socia movado. La programo inkluzivis prelegon pri movada organizado, filmon, ekspozicion de libroj kaj revuoj, kaj dancadon. /Esperanto 3/1988/

Unika televida kurso pri Esperanto pretegas en la ĉina marborda urbo Qingdao. La lokaj Esperanto-asocio kaj televida stacio kunlaboras por filmi la uzon de Esperanto en diversaj ĉiutagaj situacioj, per "viglaĵ praktikaj interparoloj", skribas Dai Songen, kiu intencas poste proponi la kurson por internacia uzo.

(Esperanto 3/1988)

Dank' al la klopodoj de profesia tradukisto Andrea Gabison, la Itala Asocio de Tradukistoj kaj Interpretistoj agnoskis Esperanton kiel unu el la lingvoj, pri kiuj ĝiaj membroj povas okupiĝi profesie. Interalie tio fikigas normon por salajrata tradukado el aŭ al Esperanto: minimume po 18 000 liroj por unu paĝo, same kiel por naciaj europaj lingvoj.

/Esperanto 3/1988/

Internacia jurio kadre de Unesko elektis Esperantan afison kiel unu el la 153 plej belaj en la mondo por 1987. Temas pri reklamilo desegnita de juna zagrebano Nenad Dogan por la pekina premiero de "Virino, kiu flustris en uragano" - soldramo pri Hasagawa Teru de Spomenka Štírnec. La elektitaj afisoj nun rondvojaĝas la mondon en ekspozicio. /Esperanto 3/88/

Lastatempe fondigis ATEO, Ateisma Tutmonda Esperanto-Organizo, kun la celoj progresigi ateismon kaj raciisman liberpensadon inter esperantistoj kaj disvas-tigi Esperanton inter ateistoj. La unua prezidanto estas Ralph Dumain; inform-petojn sendu al la sekretario Minerva Massen, 855 La Playa no. 458, San Francisco, CA 94121-3255, Usono. /Esperanto/

La unua vortaro (1430 vortoj) de la nigria interlingvo "Guosa" prezentigis al la publiko fare de la federacia inform-ministro Momoh en la Nacia Teatro en Lagos. "Guosa" estas kreita de Alex Igbiné-wéka por roli kiel interreta planlingvo en Nigero, la plej multetna kaj mult-homa stato de Afriko. (E. Schwarzer) Du aliaj planlingvaj projektoj lastatempe vigletis. "Glosa", izolca kaj bazita

Okaze de la 1-a de majo la prezidento de Ĉeĥoslovakio atribuis honorajn titolojn "nacia artisto" al elstaraj reprezentantoj de ĉeĥoslovaka kulturo.

Kun granda fiera ni konstatas, ke inter la honorigitaj personoj troviĝas ankaŭ du niaj samideanoj, nome

D-ro František K o ŝ í k ,
ĉeĥa verkisto, honora prezidanto de artiliteratura sekcio de Ĉena Esperanto-Asocio, honora membro de ĈEA,

Ota S k l e n ĉ k a ,
populara teatra, filma, televida kaj radia aktoro, membro de ĈEA. Li devenas el esperantista familio, lia patro estis longjara ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥoslovakio.

Sincerajn gratulojn!

red-

sur la antikva greka, starigis edukan fonduson, dum la du restantaj revuetoj de la naturalisma "Interlingva" kunfandigis en pli interesan, "Panorama".

/Esperanto 3/1988/

Internacia Konferenco por la evoluo de Esperanto en Iberameriko, Havano - Kubo, 30 novembro - 2 decembro 1988. Kunauspicias: Universala Esperanto-Asocio, Kuba Esperanto-Asocio, Akademio de Sciencoj de Kubo, Ministerio pri Kulturo, Eldonejo en Fremdaj Lingvoj "José Martí", Kuba Kongresa Buroo, Kongresa Palaco.

La celo de la konferenco "Esperanto '88" estas evoluigi Esperanton en la amerika kontinento, sed oni bonvenigas esperantistojn el la tuta mondo. En la programo de "Esperanto '88" alternos kulturaj arangoj kaj diskutoj, prelegoj kaj vizitoj al historiaj aŭ turismaj lokoj, laborkunsidoj kaj amikaj renkontigoj. Prezoj por ĉiu persono (8 tagojn kaj 7 tranoktojn) en dulita ĉambro 594 US dolaroj (unua kategorio) aŭ 501 US dolaroj (turisma kategorio). La prezoj inkluzivas enskribigon, bonvenigan koktalon, liton, matenmangon kaj alian mangon, transporton, labordokumentojn kaj adiaŭan tagmangon.

La tradicie gastema lando Kubo atendas vian viziton! /Kuba E-Asocio/

En Ĉinio aperis merite de s-ano Ĉin Kaj-ĝi kaj de la Filatela Societo de Pekina Esperanto-Asocio "Bildparto ori la Ĉinaj postaj stampoj". Ses el ili estas el la jaroj 1985-86, la cetero - 52 - el la jubilea jaro 1987, sume 58 postaj stampoj en 50 urboj. Ĉiuj rilatas al Esperanto.

/jm/

Pola Esperanto-Asocio proklamis la jaron 1988 JARO DE ANTONI GRABOWSKI pro la fakto, ke pasas 100 jaroj de post la apero de la unua literatura verko en E-o ("La nega blovado" de Puŝkin en la traduko de Grabowski), ke pasas la 70-a datreveno de la apero de esperantlingva "Sinjoro Tadeo" (de Mickiewicz en la traduko de Grabowski) kaj ke la 16-an de majo 1988 Pola Esperanto-Asocio farigis 80-jara kaj ĝia unua prezidanto estis Antoni Grabowski. Kune kun tio Radio Polonia organizis konkurson, en kiu necesas ĝis la 30-a de septembro 1988 respondi al jenaj demandoj: Kiaj pensoj venis al vi post la tralego de "Sinjoro Tadeo"? Kio speciale impresis vin en ĉi tiu verko? Kion vi eksciis pri nia lando laŭ la enhavo? La respondojn oni sendu al Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Varsovio, Pollando. Multaj objektaĵaj premioj kaj E-libroj estos atribuitaj al la aŭtoroj de la plej interesaj konkursaĵoj.

/Radio Polonia/

Post jardekoj da suspekto aŭ persekuto kontraŭ esperantistoj komencigas malglaĉiĝo en Albanio. Unu el la konataj albanaj leksikologoj nun faradas prelegojn pri E-o okaze de la jubileo. Komencigis kompilado de albana-Esperanta vortareto sub la supervido de Marcel Cortiade, estis, oficisto de la franca ambasadejo en Tirano.

/Esperanto 4/1988/

Minimume 5 milionoj da jugoslavoĵ spektis televidan kvizelsendon 11.12.1987 dedicitan preskaŭ entute al Esperanto. En 1987 aperis en Jugoslavio pli ol 150 artikoloj, 200 radio-elsendoj kaj 15 televidaj prezentoj. /Esperanto 4/1988/

Kunveno de korespond-kursanoj.

Slovakia Esperanto-Asocio aranĝis inter la 1-a kaj 4-a de aprilo 1988 en Poprad Internacian renkontiĝon de frekventantoj kaj gvidantoj de korespondaj kursoj. Partoprenis reprezentantoj de HEA, ĈEA kaj SEA. Aligintaj popoloj ne alveturis. Krom la kutimaj amuzaj, ekskursaj kaj klerimaj arangoj okazis unutaga instruado laŭ rekta metodo, lingvaj konsultiĝoj kaj la kunsido de reprezentantoj de unuopaj E-asocioj por interŝanĝi spertojn, komune serĉi plian efikon de la perletera instruado kaj laboro kun la frekventintoj. Oni konstatis tian kunlaboron tre utila kaj decidis okazigi venontjare la samon kaj inviti ankaŭ reprezentantojn de GDR kaj Bulgario. /H. Struncová/



Antaŭ kelke da jaroj anoj de rondeto "Amikoj de Esperanto" el urbo Ostrava ligis kontaktojn kun kamcatka klubo "Orienta avangardo". Per la leterkontaktoj la ĉs. esperantistoj ekkomprenis, ke en la kamcatka ĉefurbo Petropavlovsk-Kamčatskij estis inaŭgurita memorŝtono al herooj: Vojcešek, Bochniak, Davidov, kiuj estis persintaj dum batalo kontraŭ blank-gvardiuloj en junio 1922.

Mi alvokas ĉiujn ĉs. esperantistojn por helpi en serĉado de eventualaj vivantaj parencoj de Vojcešek aŭ Bochniak, pri kiuj oni supozas, ke ili estis aŭ ĉejoj aŭ poloj, por ke la parencoj estu informitaj pri ilia heroco. Se oni trovas ion, bonvolu turni sin rekte al instruisto de E-klubo "Orienta avangardo" s-ano Andris

Natinj, Bulvar Ribackoj Slavi 3 - 10, 683024 Petropavlovsk-Kamčatskij, USSR aŭ al s-ano Antonin Bombionka, Sokolovská 1178, 708 00 Ostrava-Poruba. /AB/

La 22-an de januaro okazis en Jelenia Góra publika renkonto kun la fama pola poeto kaj dramisto Tadeusz Rożewicz, okaze de la apero de lia "Formoj de vizaĝo" en Esperanto. Tiu ĉi estis lia unua publika prezentiĝo post 10-jara rifuzo esti intervjuata kaj partopreni publikan renkontojn. /Esperanto 4/88/

Komence de la pasinta jaro en la sidejo de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj en Moskvo estis registritaj ĉ. 200 E-kluboĵ tra la lando. ASE mem konsciis, ke tiu nombro ne estas kompleta kaj iniciatis enketon pri eventualaj pliaj grupoj kaj kluboj ankoraŭ nekonataj al ĝi. - En decembro 1987 aperis tre pozitiva intervjuo pri Esperanto en "Sputnik", vaste legata resumrevuo de la sovetiaj komunikiloj. Dimitri Perevalov, gvidanto de la sovetia MEM-sekcio, sukcesis en malmultaj vortoj doni interesan bildon pri la movado. /Esperanto 4/

De la 24-a ĝis 27-a de marto okazis en Sacramento, Usono, Tutkalifornia E-Konferenco kun la temo "Esperanto kiel pontlingvo en edukado". La temana sekcio de la programo aŭspiciis la Ŝtata Departemento pri Edukado de Kalifornio, kiu konsideras la eblan enkondukon de E-o kiel nedevisa fremda lingvo. /Esp.4/88/

La Estona Radio ŝanĝis la ondolongon kaj tempon de siaj elsendoj en E-o. Nun ili okazas ĉiun unuan kaj trian ĵaŭdon de la monato je ondolongoj 290m/1035kHz kaj 50,6m/5925kHz je 21h25 laŭ Uniuersala Tempo. La ripetoj okazas dimanĉe samsemane je 9h20 laŭ UT. Elsendodaŭro 10 minutoj. Skribu al Esperanto, Estona Radio, Tallinn, SU-200100 Sovetunio.

Radio Polonia elsendas nun unuhoran programon en Esperanto ĉiutage inter la 5-a kaj 6-a horo UT (6-7 vintre kaj 7-8 somere en Ĉeĥoslovakio) per ondoj 200m/1503kHz, 41,2m/7270kHz, 48,90m/6135kHz kaj 50,04m/5995kHz. Skribu al Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, 00-950 Varsovio, Box 46, Pollando. La ceteraj elsendoj estas je 11h, 15h30, 16h30 kaj 21h30 laŭ UT. /Radio Polonia/

Rondeta vivo



BRNO. Nova kurso por komencantoj, kvarmonata, estis komencita la 1-an de marto 1988 kun 16 gelnantoj. - La antaŭa kurso estis komencita la 6-an de oktobro 1987, ĝi estis kvinmonata kun 11 kursoj. En ambaŭ instruas J. Vondroušek.

Solena koncerto al la 100-jara jubileo de Esperanto estis aranĝita la 25-an de aprilo 1988. Rolintoj estis: merita artisto Václav Halíř, Infana zimbazona rondeto "Pěsnička", violon-virtuozo J. Jakubec, ĉio sub la arta gvido de Helena Supová-Halířová. Granda partopreno, entuziasmo, ovacioj. (J.Vondroušek)

HAVÍŘOV. La rondeto festis la 24-an de marto la Internacian Virinan Tagon per kora bondeziro fare de la prezidanto Zd. Heiser kaj per regalo de ĉiuj 24 ĉeestantoj, el tio duono de virinoj. Kvin junaj kursaninoj salutis la virinojn kantante kaj recitante poemojn. Poste s-ano Holan projekciis tri seriojn de diapozitivaj: unue pri kongreso de Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj en Katowice kaj pri vizito de Krakovo en 1987, plu vekis specialan intereseon serio de bildetoj pri merla familio, kiu nestis sur balkono ĉe lia loĝejo kaj tie elkoviĝis tri birdidoj. La tria serio prezentis belegan florekspozicion Flora en Olomouc. S-ano M. Pastrák referis pri enhavo de ĈEA-Infomilo. Vere agrabla vespero, kiun finis komuna kantado ĉe akompano per elektra akordorgeneto fare de ing. Zd. Novotný. (AST.)

TŘEBÍČ. Esperanto-klubo en Třebíč kun ankaŭ multaj enlandaj kaj eksterlandaj E-kluboj partoprenis al "Agado E3". Celo de tiu ĉi longjara kampanjo estas inter alie helpi al Afriko per okulvitroj. Do, se vi havas hejme ie por vi jam nebezonaĵajn okulvitrojn, bonvolu sendi ilin al E-klubo Třebíč.

Esperanto-klubo en Třebíč eldonis broŝuron de Miroslav Malovec sub titolo GRAMATIKO DE ESPERANTO. Tiu ĉi broŝuro estis verkita Esperante, do ĝi estas destinita al bonaj esperantistoj, kiuj vere scias pliprobudi siajn gramatikajn konojn de Esperanto. Partoprenantoj de SET ĝin aĉetos en Lančov, por aliaj ĝi estas havebla ĉe ĈEA.

Esperantistoj el Třebíč kunvenas jam kelkajn jarojn en nova klubejo en la domo, kiun la klubo heredis post prof. Theodor Kilián, aŭtoro de multaj lernolibroj. La nova klubejo situas ĉe la strato Příční. Nun esperantistoj proponis al la Urba nacia komitato nomi tiun ĉi straton ESPERANTO-STRATO. Pri la oficiala festo ni fruĝ informos. (Miloš Stastný)

ZNOJMO. La klubo aranĝis la 24-an de marto 1988 VESPERON DE ESPERANTO en salonego de Kulturdomo. La programo konsistis el deklamado, prelego pri Japanujo kun koloraj lumbildoj kaj ekspozicio de bildkartoj. Pri vojaĝo kaj renkontiĝo kun esperantistoj en Japanujo parolis s-ano Jaromír Polák. Li vizitis la urbojn Osaka, Hiroŝima kaj Nagasaki. Dum restado akompanis lin leteramiko el Osaka. La programo tre plaĉis al la klubanoj kaj novaj adeptoj de Esperanto. S-ano Polák parolis pri Japanujo jam dekfoje ankaŭ en lernejoj kaj kulturdomoj. Li tre bone propagandis nian internacian lingvon - Esperanton. (V.Rotrekli)

KONVERSACIO por progresintoj



Dekkvena temo: L A B O R O K A J T E K N I K O

En la vivo estas diversaj bezonoj. Por kontentigi ilin la homoj prenas diversajn objektojn aŭ artiklojn, kiujn ili konsumas. La konsumado estas aŭ rapida, tuja, aŭ malrapida, tamen per longa uzado la objekto estas uzdifektita. La artiklojn produktas metiistoj el kruddajoj. Nuntempe oni produktas industrie, nome en grandaj kvantoj per helpo de maŝinoj. Tion oni nomas fabrikado. Sed krom produktado aŭ fabrikado laboras la homoj ankaŭ en komercado, riparado, transportado, servoprezentado, administrado kaj kulturo. Ili havas diversajn profesiojn. En tiuj profesioj ili laboras por aliaj kaj ricevas por tio regulan salajron aŭ unufojan honorarion aŭ premion. Plej ofte tio estas mono. Paperaj monbiletoj estas fakte asignoj certigataj de ŝtata banko, kiujn ĉiuj ŝtatoj akceptas kaj pagas per ili. Metalaj moneroj estis pli frue el valoraj metaloj, sed pro ofta cirkulado ili estis uzdifektitaj. Tial oni stampas nun monerojn por malgrandaj valoroj, alie validas monbiletoj aŭ banknotoj. En diversaj ŝtatoj estas diversaj monistemoj, proporcioj inter ili estas kurzoj.

La homo preparas sin por certa profesio aŭ fako, specializas sin por certa laboro kaj estas dungata de labordonanto, por labori dum lege fiksita tempo. Laborantoj estas en sindikatoj, kiuj zorgas pri iliaj rajtoj kaj pretendoj. Se laborantoj ne estas kontentaj, ili ĉesas labori kaj strikas. Nur sana homo plene laboras, en malsano aŭ maljunaĝo homoj ne laboras kaj ricevas pensiojn invalidajn aŭ maljunaĝajn. Sed pensioj ne estas en ĉiuj ŝtatoj, ie oni postulas, ke laboranta sana homo estu asekurata, alie tia homo petas almozon.

Por la laboro bezonas la homoj diversajn ilojn kaj instrumentojn. Pli komplikaj estas aparatoj kaj maŝinoj, kiuj iam eluzas alian energion. Ili havas komplikajn mekanismojn. Automatoj laboras mem, homoj nur kontrolas kaj inspektas. Robotoj estas iam automatoj homaspektaj. En automatikaj fabrikoj estas komutilaro, motoroj, maŝinoj kaj transmisioj laboras tute sendepende, la homo nur atentosekvas montrilojn de mezuriloj. Ekzistas eĉ komputiloj, kiuj plenumas kaj solvas eĉ aferojn de direktado. La teorio pri direktado estas kibernetiko.

Simplaj iloj estas marteloj por enbati najlojn kaj pinglojn, tenajloj, per kiuj oni eltiras ilin, tranĉiloj, segiloj kaj tondiloj. Ŝraubo kun helicerio estas fiksataj per ŝraubturniloj. En ŝraubturniloj estas fiksataj materialoj, kiujn oni fajlas, glaŭigas la surfacon, aŭ rabotas, do oni fortranĉas striojn. Oni ankaŭ boras truojn en materialo, frezas la materialon per akraj dentoj de segiloj aŭ ĉizas per noĉoj. Noĉoj estas entranĉoj en materialoj. Per ŝoveli-

loj oni ŝutas amasojn, per restiloj oni kunportas ilin. Por rikolti herbojn oni uzas falĉilojn au kurbajn serpojn. Per kribriiloj oni deigas diverse grandajn grajnoj. Ramilo ŝtopas kaj premas argilon kaj sablon por malmoligi la mason. Spato estas speciala ŝovelilo, kiu pli bone penetras en la materialon. Hakilo kaj pioĉo estas grandaj marteloj kun pintoj. Nito kunigas du platojn. La principo de multaj iloj estas kojno, kiun oni bezonas iam pliakrigi. Pikilo estas ilo, kiu faras truojn en mola materialo. Nadlo estas malgranda pikilo, ekzemple por kudri, tial ankaŭ kudrilo. Sed ekzistas eĉ nadlo en kompasoj. Rado estas sur akso, kiu nomigas ŝafto, ĝi pliebligas movon, ĉar ŝnuro sur rando de rado pli facile portas objektojn. La tuto estas pulio. Aparatoj kaj maŝinoj konsistas el pluraj tiaj kojnoj, stangoj, ŝaftoj, radoj, ŝraŭboj kaj aliaj iloj. Kelkaj maŝinoj situas sur framoj. Oni ilin ekfunkciigas per startiloj, ŝaltiloj au komutiloj. Per manoj oni tenas kaj movas stangojn, per piedoj pedalojn. Por bona rotaciado estas radoj kaj ŝaftoj en lagroj. Pivotoj estas ingoj, en kiuj la objekto moviĝas au rotacias. Rimejoj kunigas du netuŝantajn radojn, la tuŝantaj radoj havas dentojn. Klapoj fermas kaj malfermas truojn. Valvoj estas en elektra cirkvito. Karburiloj ebligas diskutadon de fluaĵoj. Por ke la mekanismo bone funkcii, oni ĝin lubrikas per ŝmiraĵo, oleo au grafito. Motojoj liveras energion al funkciado de maŝinoj.

Krudaĵoj estas el mineraloj, vegetaĵoj au bestoj. Ministoj minas karbon, ŝtonon, argilon kaj ercon. Ercojn oni fandas kaj ricevas metalojn. Plej ofta metalo estas fero, tre malmola fero estas ŝtalo. Stano estas metalo, kiun oni povas bone batplatigi, kupro estas flava metalo bone kondukanta elektron, plumbo estas peza, aluminio malpeza. Flava oro kaj griza argento estas valoraj metaloj. Latuno kaj bronzo estas alojoj el du metaloj. Muldisto verŝas likvajn metalojn en formojn, veldisto kunigas metalojn, kies ekstretoj estas ankorau likvaj. Lutisto verŝas likvan metalon en breĉon inter du solidaj metaloj. Metaloj estas likvaj en grandaj temperaturoj, sed diferencaj. Forĝisto martelas feron kaj ŝtalon, kiuj estas inkandeskaj. El metaloj estas plata lato. El metaloj estas multaj instrumentoj. Sed se ili ne estas flegataj, do fero rustiĝas kaj aliaj metaloj koroziĝas. Metalojn bezonas seruristoj, instalistoj, lutistoj, ladaĵistoj, tranĉilistoj, hufumistoj kaj aliaj metiistoj. El ligno pretigas ĉarpentistojn, lignistojn kaj ĉeyronojn, lignaĵistojn, sojlojn kaj fenestrojn. Lignon uzas ankaŭ meblisto, barelisto, tinjisto kaj korbisto. Tinoj estas lignaj pakaĵoj, korboj estas sakoj au ujoj el branĉetaro. Vitro estas travidebla materialo el fandita sablo. Vitron oni facetas, pentras, muldas au prilaboras alie. Masonisto konstruas murojn, niĉojn kaj aliajn partojn de domoj. Tapetisto surgluas tapetojn sur vandoj, sur plankoj estas tapiŝoj. Lakistoj kaj kolorigistoj beligas loĝejojn. Nian mangadon prizorgas buĉistoj, kiuj buĉas bestojn por viando kaj graso, fumajistoj, muelistoj, maltistoj, kuiristoj, bakistoj, sukerfaristoj, sukeraĵistoj kaj aliaj. Materialojn por ili pretigas plej multe terkulturistoj sur kampoj, en ĝardenoj kaj plantejoj. Ili plugas kaj erpas, semas, rikoltas kaj kunligas garbojn. Kelkajn kampojn ili lasas novali. Ili samtempe bredas dombestojn, kiujn ili iam paŝtas. En arbaroj estas kolektataj fungoj kaj fruktoj. El argilo kaj sablo estas modlataj diversaj figuroj. Vendistoj vendas varojn al klientoj en vendejoj, butikoj kaj standoj, kelneroj en restoracioj kaj hoteloj. Oficistoj laboras en

administrado, cindristoj forkondukas cindrojn kaj aliajn formetindaĵojn. Ĉasistoj ĉasas bestojn kaj fiŝojn. Ĉe multaj bestoj oni povas utiligi ankaŭ viscerojn, tripojn, haŭton, felon kaj aliajn partojn.

La laboro estas iam penega kaj klopoda. Oni devas gajni lertecon en uzado de iloj, komence oni povas havi kalojn sur manoj. Nur poste oni laboras kun rutino. La tekniko eluzas ĉiujn aperaĵojn de la naturo kaj plifaciligas la laboron. Teknologio estas instrukcio, kiel fari certan laboron. Homoj, kiuj ne konas bone sian laboron, fuŝas.

Aŭtarco ne estas plu ebla, la rezultaĵoj de diversaj laboroj estas interŝanĝataj, oni vendas kaj aĉetas, krom normalaj vendejoj ekzistas foiroj, borsoj, komercejoj, magazenoj kaj aliaj. Principoj de bona komerco estas merkato. La ekonomio estas teorio pri bona kaj prospera mastrumado. La laboroj estas alportontaj gajnojn, sed iam estas eĉ perdoj. La entreprenado faras certan ekonomian agadon por havigi gajnon. La plano de en- kaj elspezoj estas buĝeto. Oni parolas pri financoj de entreprenado au de organizo. Oni povas eĉ prunti financajn rimedojn, oni fariĝas ŝuldanto. Oni pagas ne nur per konstanta mono, sed per ĉekoj, ĝiroj kaj kambioj. En moninstitutoj, bankoj kaj ŝparkasoj estas deponoj, kontoj, trezorejoj. Por mono oni pagas interezojn. Dum prunto oni volas krom interezo eĉ garantiĝaĵon; lombardo estas garantiĝaĵo movebla, hipoteko estas garantiĝaĵo, kiel domo, grundo, kampo. Se oni malbone mastrumas, oni bankrotas. La entreprenoj faras bilancojn, kie ili elskribas siajn aktivojn kaj pasivojn. Ĉekoj, kambioj kaj aliaj biloj estas valoraj biloj, se ili prezentas ian valoron. Kambio estas transdonita ŝuldo. Se tiu ŝuldo estas en alia monsystemo, do ĝi estas devizo. Alia monsystemo estas valuto. En ekonomio alternas periodoj de konjunkturo kaj krizo, alternas oferto kaj mendo, en bona ekonomio ne estas senokupituloj. Sed la ekonomio bezonas ankaŭ gardi la ekspluatadon de naturaj fontoj, ke ne aperu ia ekologia katastrofo. Ekzemple multaj aŭtomobiloj kaj fultuboj de fabrikoj difektas la aeron, arbojn kaj vegetaĵojn. Kaj momenta gajno povas fariĝi estonta perdo.

GRAMATIKO: 1 Trovu vortojn kun sufikso -ilo kaj diru ilin en frazoj
2 El substantivoj kun sufikso -isto diru adjektivojn kaj uzu ilin en dek frazoj

STILO: 1 Skribu pri via laboro, salajro kaj eluzo de tiu salajro, kiel vi ŝparas, kiel vi plenumas vian buĝeton
2 Skribu tekston de ia financa dokumento: ĉeko, kambio, kontrakto, konfirmo, poŝtpagilo ks.
3 Kiujn ilojn, aparatojn au maŝinojn vi uzas en via profesio?
4 Ĉu vi ŝatas fari hejme diversajn manlaborojn?

DEMANDOJ: 1 Kiam oni ŝanĝas monon? Ĉu vi jam ŝanĝis monon? Kia estis la kurzo?
2 Kion vi scias pri Esperanta mono?
3 Lau kio direktiĝas la salajro?
4 Elektu dek objektojn kaj diru pri ili, el kiuj materialoj ili estas
5 Kiam estas la konjunkturo en diversaj entreprenoj?
6 Kiuj vendistoj estas ŝatataj?
7 Kion oni faras kun la cindro en urbo?
8 Ĉu ekzistas nur unu ekonomio? Kion vi scias pri la ekonomio ĝenerale?
9 Kion vi scias pri la ekologio?

(Josef Chvosta)

En la 6-a numero de Starto 1987 en la Konversacio por progresintoj bonvolu angustiaŭgi la alineon pri la matematiko sur la pago 22 sube kaj sur la pago 23 per jena korekta teksto:

Oni kalkulas nombrojn. Tiuj estas nocioj por diversaj kvantoj kaj grandoj. La vico de nombroj estas senfina, oni povas numeri per anoj de tiu vico unuopajn anojn de tiuj kvantoj kaj tiel oni venas al preciza nombro. Alitempe oni mezuras grandojn per unuoj au unitoj kaj atingas ankaŭ precizan nombron. Por nombroj oni uzas simbolojn, kiuj nomigas ciferojn. Estas pluraj sistemoj, plej ofte estas uzata pozicia dekuma sistemo kun arabaj ciferoj. La teorio pri nombroj estas aritmetiko, parto de la matematiko. Bazaj aritmetikaj operacioj estas adicio, subtraho, multipliko kaj divido. Per gubtraho povas aperi nulo kaj nombroj negativaj, per divido onoj au frakcioj. En tiu kazo la nombroj originaj, naturaj estas pozitivaj, kontraŭ onoj estas nombroj entjeraj. Krom aritmetiko estas geometrio, kiu mezuras precipe longecon, areon kaj spacon. Aliaj sciencoj bezonas mezuri aliajn nociojn kaj esprimi nombrojn de mezuritaj au pesitaj unuoj. Nombroj de algebro ne havas precizan valoron, per ekvacioj oni serĉas valorojn de nekonataj nombroj. La geometrio studas ebenajn kaj spacajn figurojn. En ebena estas linioj rektaj, zigzagaj kaj kurbaĵoj, oni desegnas ilin per linioj, do rektiloj au kurbiĵoj, au per cirkeloj. El ili estas lateroj au arkoj de ebenaj figuroj. Tiuj havas siajn konturojn, oni mezuras longecon de lateroj kaj arkoj. Sumigante tion oni elkalkulas perimetron. La areon de figuroj oni ankaŭ elkalkulas. En ebena du rektoj povas en sama punkto kruciĝi en kvar ortaj anguloj, la ebena estas dudimensia. Gravaj ebenaj figuroj estas kvadrato, ortangulo, triangulo, trapezo, cirkloareo. Solidoj estas spacaj figuroj, kiuj estas tridimensiaj. Gravaj estas kubo, paralelepipedo, prismo, piramido, cilindro, konuso, globo. Oni elkalkulas el dimensioj surfacan areon kaj volumenon de koncerna solido. Analitika geometrio kunigas aritmetikon kaj geometrion, ekzemple en grafikaĵoj kaj diagramoj. Deskriptiva geometrio ebligas desegni solidojn sur papero. Oni desegnas horizontalan projekcion, frontan kaj flankan projekciojn, profilojn, iam oni uzas nur rapidan skizon, alitempe oni proponas spacan modelon. Tion bezonas ĉefe arkitektoj kaj konstruistoj. Sed eĉ aliaj sciencoj eluzas iel la matematikon. Dum kalkulado oni atentigas proporciojn inter mezurunuoj.

(Josef Chvosta)

PASPORTA SERVO

En Budapeŝto aperis nova adresaro "PASPORTA SERVO". Ĝi enhavas 900 adresojn de gastigantoj el 58 landoj de la mondo. Tiuj homoj ofertas al vi senpagan tranoktadon en siaj hejmoj. Kondiĉoj estas jenaj:

- Esperanto-lingvokono
- plenumo de la kondiĉoj de la gastiganto
- posedo de la adresaro "PASPORTA SERVO"

La adresaro kostas 40 Kčs kaj estas aĉetebla ĉe la landa organizanto. Skribu al Jiří Kreuzberger, 747 56 Dolní Životice 157 (telefono hejma (653) 93514, laboreja (653) 98181).

Se vi havas eblecon, fariĝu gastiganto de la Pasporta servo. Aliĝilojn kaj detalajn informojn vi ricevos sur la sama adreso.

ĈAPITROJ el INTERLINGVISTIKO

7. Ido

En la jaro 1907 eldonis - komence anonime - du el la gvidaj funkciuloj de la E-movado, Luis de Beaufront /1855-1935/ kaj Luis Couturat /1868-1914/, sian reformon de Esperanto sub la nomo Ido. Al la aŭtoroj ne plaĉis de Esperantaj supersignoj, tial ili unuavice forigis ilin, enkondukis la literojn q, x, y kaj ŝangis la prononcon jene: ĵ = ĵ; y = ĵ; sh = ŝ; ch = ĉ; x = ks aŭ gz; au, eu = au, eŭ; gua, gue, gui, quo = kua, kue, kui, kuo; gua, gue, gui, guo = gua, gue, gui, guo. La substantivoj ricevas en la pluralo la finaĵon -i /patro - patri/, tial la infinitivoj finigas per - ar /amar, venar/. La akcento restis plejparte sur la antaŭlasta silabo, nur la infinitivo ĝin havas sur la lasta /amas - amár/ kaj la vortoj finigantaj per -ia, -ie, -ii, -io, -ue, -ui, -uo sur la antaŭ-antaŭlasta /ministério, língui, indústriu, révuu/. La adjektivoj estas sensangaj /la bona patro - la bona patri/, kaj la akuzativo estas uzata nur antaŭ verbo /la bona filon vidas la patro - la patro vidas la bona filo/. Ŝangitaj estas la personaj pronomoj: me = mi, tu = ci, vu = vi /respekte al unu persono/, il = li, el = ŝi, ol = ĝi, lu = li, ŝi, ĝi /sengenra/, ni = ni, vi = vi /pluraj personoj/, ili = ili /viroj/, eli = ili /inoj/, oli = ili /bestoj, aĵoj/, li = ili /sengenra/. Interesaj estas la verboj. Ili havas infinitivojn prezencan /amar/, preteritan /amir/ kaj futuran /amor/. La ceteraj finaĵoj restis /as, is, os, us, anta, inta, onta, ata, ita, ota/, krom la volitivo /-ez/, ekzemple: amez = amu. En la senco de "esti" estas uzata "esar", aplikebla ankaŭ kiel sufikso: me esas amata = me amesas /mi estas amata/, esar amata = amesar /esti amata/, esar batata = batesar /esti batata/. Ankaŭ la aktiva imperfekto estas kurtigebla: me esis batinta = me batabis /mi estis batinta/, me esos batinta = me batabos /mi estos batinta/. La komparacio aspektas jene: plu bona /= pli bona/, maxim bona /=plej bona/. La tabelvortoj estis forigitaj kaj anstataŭigitaj per latindevenaj vortoj: omna = ĉiu, qua = kiu, quo = kio, sempre = ĉiam ktp. La vicajn numeralojn formas la sufikso -esma: unuesma = unua, duesma = dua ktp. La derivaĵoj estas pli naturalismaj: naciono /nacio/, nacionala /nacia/, nacionaleso /nacieco/, nacionalisar /naciigi/. Kompreneble, multaj konkretaj vortoj estis ŝangitaj, ortografie, forme aŭ tute anstataŭigitaj: reĵo /rego/, brakio /brako/, extere /ekstere/, anke /ankau/, di /de/, e /kaj/, puero /knabo/ k.a. Ankaŭ la afiksoj estas ŝangitaj aŭ modifitaj: patri /gepatroj/, patruli /patroj/, patrini /patrinoj/, rejido /regido/, hunduno /hundido/, grandeso /grandeeco/, florifar /flori/, silka vesto /silka vesto/, silkala industrio /silka industrio/, silkoza chapelo /silka ĉapelo/, silkifanta raupo /silka raupo/. Estas konate, ke Ido reefikis al Esperanto, kiu transprenis la sufikson -aĉ- /-ach-/, vortojn "dura, aperti" k.a.

La idistoj fondis la faman industriian kooperativon de ĉeĥoslovakaj komunistoj Interhelpo, kiu en la jaroj 1925-1943 laboris en la azia Sovetunio, apud la urbo Frunze. Ĉu vi komprenas la komencon de la fama fabelo de Andersen?

La ferma stansoldato. Olim esis duadek e kin stansoldati, qui omna esis frata, pro ke on muldabis li de la sam olda stankuliero. Fusilon li tenis per la brakio, turnante sua vizajo adavane kontre la enemiko; reda e blua, unvorte belega, esis lia uniformo.

8. Novial


La fama dana lingvisto J.O.H. Jespersen /1860-1943/, kiu riĉigis la lingvosciencan precipe en la sfero de fonetiko kaj anglistiko, kontribuis ankaŭ al la disvolvigo de la interlingvistiko. En 1928 li publikigis sian projekton Novial /Noy International Auxiliari Lingue - Nova Internacia Helpa Lingvo/, kiu ne ludis grandan rolon en la praktiko, sed tre gravas, ke Jespersen trovis argumentojn por defendi la ideon de internacia lingvo. "Ofte oni kontraŭdiras, ke la konstruitaj lingvoj neniam povas esti tiel bonaj kiel la naturaj lingvoj. Estas vero, ke Novial ne estas tiom rica kiel la angla, tiom eleganta kiel la franca, tiom energia kiel la germana, tiom bela kiel la itala, tiom rica en esprimoj kiel la rusa, nek tiom agrabla kiel nia patrolingvo. Sed necesas konscii, ke ĉiuj ĉi bonaj kvalitoj, pro kiuj oni estimas la naturajn lingvojn, povas aplikigi nur tiam, kiam uzas ilin parole kaj skribe indigeno. La helplingvo tre facile povas igi pli rica ol la angla en la buŝo de franco, kaj multe pli eleganta ol la franca de dano, pli energia ol la germana de italo, pli bela ol la itala de anglo, pli rica en esprimoj ol la rusa parolata de germanoj kaj pli agrabla ol mia propra patrolingvo en la buŝo de ruso."

Aliaj teoriistoj pli poste kompletigis la ideon de Jespersen per argumentoj kontraŭ la riproĉo, ke la helplingvoj esprimas la ideon de kosmopolitismo, kontraŭpatriotismo kaj malestimado de la naciaj lingvoj. Ĉiu homo estas ano de iu nacio, sed pro tio li ne ĉesas esti samtempe loganto de certa urbo aŭ vilaĝo unuflanke kaj ano de la tuta homaro aliflanke. Kiel logantoj de certa regiono ni parolas la regionan dialekton kaj interesigas pri la kulturo kaj historio de la regiono. Kiel anoj de certa nacio ni parolas ankaŭ la tutnacion lingvon kaj interesigas pri la kulturo kaj historio de nia nacio. Kiel membroj de la tuta homaro ni interesigas pri la mondhistorio, mondkulturo, mondpolitiko, mondsporto, do kial ni ne parolu ankaŭ internacilingve?

9. Occidental - Interlingue

En 1922 aperis la internacia lingvo Occidental, kies nomo en 1947 estis ŝanĝita al Interlingue. Ĝia aŭtoro estis estona lingvisto Edgar de Wahl /1867-1948/. Li klopodis konservi en sia lingvo la klasikan aspekton de la internaciaj vortoj, kiel ili estas konataj el la mondlingvoj, precipe el la angla, franca, hispana kaj itala, ekzemple "barbero, oculist, botanico, lucta, biblioterario, victorea, decorar, definir, exploder, constructer, construction,

conservar" ktp. La personaj pronomoj: yo - mi, tu - ci, il - li, ella - ŝi, it - ĝi, noi - ni, vu - vi, illos - ili /viroj/, ellas - ili /inoj/, ili - ili /aĵoj/, on - oni.
 La verboj finiĝas en la infinitivo per -ar, -er, -ir /amar, vider, petir - ami, vidi, peti/, kio influas ankaŭ la ceterajn formojn.
 La prezenco: yo ama, vide, peti - mi amas, vidas, petas. La preterito: vu amat, videt, petit - vi amis, vidis, petis. La futuro: il va ama, va vide, va peti - li amos, vidos, petos. La aktivaj participoj: amant, vident, petient - amanta, vidanta, petanta.
 La pasivaj participoj: amat, videt, petit - amata, vidata, petata. La participoj ne havas tri tempojn kiel en Esperanto, tial Occidental-Interlingue eluzas la pasivajn por pliprecizigi la tempojn laŭ la modelo de la angla: yo ha videt - mi estas vidinta /mi havas vidite/, yo hat videt - mi estos vidinta /mi havos vidite/, yo es videt - mi estas vidata, yo esset videt - mi estis vidata, yo hat esset videt - mi estis vidata ktp. La participojn de Wahl ankoraŭ pli radikale disvolvis la asocio IALA en sia projekto Interlingua.



24-jara studentino interesigas pri turismo, literaturo, lingvoj, ŝi povas paroli angle (bone), ruse kaj germane (malbone), kolektas bildkartojn. Adreso: Temenuga Gančeva, st. Iztok 40-T-60, Kazanlak 6100, Bulgario.

Flegistino volas korespondi kun diverslandanoj, ŝi interesigas pri turismo, literaturo kaj folkloro. Adreso: Zofia Borowska, ul. Nowotki 1/12, PL 62-510 Konin, Pollando.

19-jara lernanto kolektas postmarkojn. Adreso: Paweł Flak, Internat. 10, str. Koszykarska 33, PL-30-317 Kraków, Poll.

21-jara studentino interesigas pri turismo, sporto kaj literaturo, kolektas postmarkojn kaj bildkartojn. Adreso: Elżbieta Macowicz, str. Bratkowa 19, 51-250 Wrocław, Pollando.

44-jara oficisto interesigas pri turismo, li estas kasisto kaj kasas en Karkonosze, kolektas kasistajn trofeojn. Adreso: Jan Puchala, str. Jana Kiepury 18/3 PL-58-506 Jelenia Góra, Pollando.

28-jara instruistino, fraŭlino, interesigas pri turismo, vojaĝoj, muziko, kolektas sondiskojn. Adreso: Elżbieta Kuświk, str. Bieszczadzka 4, 62-600 Kalisz, Pollando.

28-jara oficistino interesigas pri turismo kaj literaturo, kolektas bildkartojn. Adreso: Grażyna Kosciowska, str. Strzałowa 1 B m 4, PL-87-100 Toruń, Pollando.

21-jara studento interesigas pri turismo, sporto, literaturo, folkloro, kolektas postmarkojn, bildkartojn, turismajn prospektojn, ilustritajn revuojn. Adreso: Maciej Lucka, str. Nowotki 23/13, PL 90-202 Łódź, Pollando.

27-jara bibliotekistino interesigas pri literaturo, turismo kaj kolektas bildkartojn. Adreso: Iwona Broniewska, PKK 9 m. 7, 40-057 Katowice, Pollando.

Marian Wolny, Wolności 1/47, PL-44-109 Gliwice, Pollando - interesigas pri karateo kaj aliaj batalartoj de la oriento, krome pri pentroarto (li mem pentras)

24-jara nova esperantisto interesigas pri turismo, literaturo, sporto, muziko, kolektas bildkartojn kaj postmarkojn. Adreso: Sławomir Szczygieł, ul. Bałtowska 323, 27-400 Ostrowiec, Pollando.

17-jara lernantino de mezlernejo interesigas pri muziko, literaturo kaj eksterlandaj lingvoj: Dorota Mazurek, ul. Kruczkowskiego 20/9, 20-468 Lublin, Pollando.

29-jara edziniginta virino interesigas pri turismo, folkloro, geografio, kolektas librojn, bildkartojn: Maria Baczynska, ul. Konopnickiej 212, PL-89-600 Chojnice, Pollando.

15-jara lernantino interesigas pri turismo, literaturo, kolektas bildkartojn. Adreso: Agnieszka Wanda Waszkiewicz, str. Pedagogiczna 12, 51-213 Wrocław, Pollando.

38-jara laboristo interesigas pri turismo, literaturo kaj folkloro, kolektas postmarkojn. Adreso: Jan Salinski, L. Czarnego 13/33, 97 500 Radomsko, Pollando.

25- kaj 23-jaraj geoficistoj lernas Esperanton duope kaj interesigas pri turismo. Adreso: Dariusz kaj Małgorzata Suszynski, ul. Sienkiewicza 45a, 62-800 Kalisz, Pollando.

Lerneja sporta instruisto dum ferioj laboras en banloko kiel instruisto de savado, li volas letere kontakti virinon 25-28-jaran, li interesigas pri turismo kaj folkloro. Adreso: Zbigniew Kochanowski, ul. Szkolna 18, 67-111 Przyborów k/Nowej Soli, Pollando.

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str. 10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Karel FRANC, Jiří HANOUSEK (grafika arango), Miroslav MALOVEC, Jiří PATERA (respondeca redaktoro) kaj Helena ŠTRUNCOVÁ. Presas OKP-6 LIBEREC. Transdonita al presejo 1988-05-31. Jarabono 36 CSK, por eksterlando 48 CSK aŭ 14 NIG, inkluzive de sendkostoj. Abonantoj turnu sin al niaj perantoj, al UEA aŭ rekte al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: K. Franc, J. Hanousek (grafická úprava), M. Malovec, J. Patera (odpovědný redaktor) a H. Štruncová. Povoleno odborem kultury NVP č. 310008385 ze dne 18. 3. 1985. Tiskne OKP-6 Liberec. Předáno do tisku 31. 5. 1988. Dohledací pošta Praha 07. Snižovaný poplatek za poštovné povolen Ředitelstvím pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6. 4. 1979.

18-jara lernantino de tria klaso de liceo, interesigas pri matematiko kaj Esperanto, si satas ankaŭ naturon. Adreso: Anna Stankiewicz, Os. XXX lecia PRL 26, 67-120 Koźuchow, Pollando.

43-jara nova esperantistino interesigas pri literaturo, distra muziko, ĵazo kaj rock and roll. Adreso: Elizabeta Stalmach, ul. Kniewskiego 3/58, PL-42-500 Będzin, Pollando.

Du novaj estonaj esperantistinoj deziras korespondi tutmonde: 39-jara fraŭlino, kolektas bild- kaj bestkartojn, poskalendaretojn, postmarkojn kaj pupojn en naciaj vestoj; adreso: Aili Petri, SU-202 500 Valga, Postkast 118, Estonio, USSR 12-jara lernantino, kolektas bestkartojn, poskalendaretojn, glu-bildojn; adreso: Merike Petri, SU-202 500 Valga, Postkast 118, Estonio, USSR.

Irina Ščanovskaja, SU-224023 Brest, Moskovskaja 340-248, 24-jara inĝenierino, deziras korespondi kun amikoj el tuta mondo pri ĉiuj temoj.

Svetlana Kucic, SU-224000 Brest, Vorovskogo 11-1, 26-jara flegistino, koresp. pri medicino, sporto, vojago, pm, bk.

Vladislav Vujek, 46-jara, deziras korespondi kun tuta mondo pri vojago, sporto, naturo k.a. SU-224000, Brest, K.Marx 53-20.

S-anino Anna Fišerová el Přelouč donacis 100 Kčs al Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Al la grandanima donacintino ni sincere dankas. Estraro de ĈEA

(Sen garantio)

MET (vintro)	Lundo	Marde	Merkredo	Ĵaŭdo	Vendredo	Sabato	Dimanĉo	Noto
6.00 - 7.00	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	A
7.00 - 7.15				VATIKANO				F
8.45 - 8.55			BERNO			BERNO		L
10.20 - 10.30							TALLIN	I
10.30 - 10.55							VIENO	H
11.45 - 11.55			BERNO			BERNO		M
12.00 - 12.25	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	B
14.15 - 14.25			BERNO			BERNO		M
16.30 - 16.55	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	O
17.30 - 17.55	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	C
18.30 - 18.40	BERNO			BERNO		BERNO		M
21.00 - 21.10							VATIKANO	G
21.00 - 21.20						ROMO		J
21.00 - 21.30	PEKINO	PEKINO	PEKINO	PEKINO	PEKINO	PEKINO	PEKINO	E
21.30 - 21.55							VIENO	H
22.25 - 22.35				TALLIN				I
22.30 - 22.55	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	VARSOVIO	D
23.45 - 24.00							ZAGREBO	K

A: 41,27; 48,90; 50,04; 200 m (7270, 6135, 5995, 1503 kHz)

B: 31,50; 41,99 m (9525, 7145 kHz)

C: 41,18; 49,22 m (7285, 6095 kHz)

D: 41,18; 49,22; 50,04; 200 m (7285, 6095, 5995, 1503 kHz)

E: 40,10; 32,00; 30,10 m (7470, 9365, 9965 kHz)

F: 48,00; 41,38; 30,75; 25,61 m (6250, 7250, 9755, 11715 kHz)

G: 196; 48,47; 48,00; 41,38 (1530, 6190, 6250 kHz)

H: 49, 25, 19 m (6000, 6155, 11915, 15410 kHz)

I: 1-a kaj 3-a semajno en monato, 290, 50,6 m (1035, 5925 kHz)

J: 31,33; 41,14; 41,24 m (9575, 7290, 7275 kHz)

K: 292, 295, 297 m (1028, 1017, 1010 kHz)

L: 31,38; 30,35; 16,83 m (9560, 9885, 17830 kHz)

M: 30,35; 25,14; 19,27 m (9885, 11935, 15570 kHz)

N: 75, 48,65, 31,46 m (3985, 6165, 9535 kHz)

**Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

NOVINY

Dohlédací pošta Praha 07
Snížený poštovní poplatek povolen
Ředitelstvím pošt Praha
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979